

E(rnst) T(heodor) A(madeus) Hoffmann:

## **La fraŭlino de Scuderi – Rakonto el la epoko de Ludoviko XIV.**

En la strato de St. Honoré troviĝis la dometo, en kiu dank' al la favoro de Ludoviko XIV. kaj de la Maintenon<sup>1</sup> loĝis Magdaleine de Scuderi<sup>2</sup>, konata per ŝiaj ĉarmaj versoj.

Malfrue ĉirkaŭ la meznokto – estis supozeble dum la aŭtuno de la jaro 1680 – okazis tiel vehementa kaj forta batado kontraŭ tiuĉi domo, ke rezonis laŭte en la tuta koridoro. Baptisto, kiu por la fraŭlino funkciis samtempe kiel kuiristo, servanto kaj pordisto, estis foririnta kun la permeso de la mastrino al la edziniĝfesto de sia fratino, kaj tiel okazis, ke La Martinière, la ĉambristino de la fraŭlino, estis en la domo sole ankoraŭ maldorma. Ŝi aŭdis la ripetfojn batojn, rememoris, ke Baptiste estis foririnta kaj ke ŝi kun la fraŭlino restis en la domo sen iu ajn protektanto. Ĉiun delikton de enrompo, ŝtelo kaj murdo iam ajn faritan en Parizo ŝi rememoris, kaj iĝis al ŝi certe, ke ia roto de banditoj sciiĝinta pri la soleco de la domo, jen ekstere furiozas kaj, enlasita, efektivigos malbonan planon kontraŭ la mastrino. Kaj tiel ŝi restis tremante pro timo en sia ĉambro kaj malbenis Baptiston samkiel la edziniĝfeston de ties fratino.

Intertempe la bategoj daŭris plu kaj plu, kaj ŝi kredis percepti voĉon kriantan: „Pro Kristo, malfermu do!“ Finfine, dum kreskis ŝia angoro, La Martinière kaptis rapide la kandelington kun la flagranta kandelo kaj kuris eksteren en la koridoron; tiam ŝi tre klare aŭdis la voĉon de la batanto: „Pro Kristo, malfermu do fine!“ - „Fakte“, pensis La Martinière, „tiel verŝajne ne parolas rabisto; kiu scias, ĉu ne eble iu persekutato serĉas rifuĝon ĉe mia mastrino, kiu ja inklinas al ĉia bonfaro. Sed ni restu singardaj!“ - Ŝi malfermis la fenestron kaj vokis malsupren, kiu tie sube dum la malfrua nokto tiel bruegas kaj vekas ĉion el la dormo. Ŝi penis doni al sia basa voĉo tiom da vireco, kiel eble. En la brileto de la lunradioj, kiu samtempe filtriĝis tra la nigraj nuboj, ŝi rimarkis longan, per helgriza mantelo ĉirkaŭvolvitan figuron, kiu tenis la larĝan ĉapelon malalte premitan super la okuloj. Nun ŝi vokis laŭvoĉe tiel, ke tiu sube staranta povu aŭskulti ĝin: „Baptisto, Klaŭdio, Petro, leviĝu kaj kontrolu, kia sentaŭgulo intencas disbati al ni la domon!“

Sed jen venis desube softa, preskaŭ lamenta voĉo: „Ah, La Martinière, mi scias ja, ke tie estas Vi, kara virino, kielajn forte Vi penas kamufla Vian voĉon; mi ja scias, ke Baptiste foriris kaj Vi estas hejme solaj kun Via mastrino. Kuraĝu nur malfermi, timu nenion. Mi devas nepre paroli kun Via fraŭlino, ankoraŭ en ĉitiu minuto.“ - „Kien Vi pensas“, respondis La Martinière, „kial Vi deziras paroli kun mia fraŭlino meze en la nokto? Ĉu Vi ne scias, ke ŝi dormas jam delonge kaj ke mi neniel vekos ŝin el la unua plej dolĉa dormeto, kiun ŝi nepre bezonas pro sia aĝo.“ - „Mi scias“, diris la sube staranta ulo, „mi scias, ke Via fraŭlino ĵus finis la manuskripton de sia romano, titolita `Clelia`<sup>3</sup>, kiun ŝi dum senripoza verkado metis flanken, kaj ke ŝi nun ankoraŭ skribas kelkajn versojn, kiujn ŝi morgaŭ volas voĉlegi ĉe la markizino de Maintenon. Mi petegas Vin, sinjorino Martinière, estu kompata kaj malfermu al mi la pordon. Sciu, ke dependas de tio, ĉu mizerulo saviĝos antaŭ la perdiĝo; sciu, ke dependas la honoro, libereco, eĉ la vivo de homo de ĉitiu momento, dum kiu mi devas paroli al Via fraŭlino. Pripensu, ke la kolero de Via mastrino pezegus eterne sur Vi, kiam ŝi ekscius, ke estis Vi, kiu kun dura koro forpelis de la pordo la mizerulon, kiu venis por peti ŝian helpon.“ - „Sed kial Vi petas pri la kompato de mia fraŭlino je ĉitiu nekutima horo; revenu morgaŭ je pli bona tempo“, tiel diris de supre La Martinière. Tiam respondis tiu suba: „Ĉu la sorto, detruite trafante kiel la mortiganta fulmo, atentis la tempon kaj horon? Ĉu rajtas, ke la helpo estu prokrastata, se nur unu ankoraŭ momento de savo eblas? Malfermu al mi la pordon, ĉesu

<sup>1</sup> *Françoise d'Aubigné, Marquise de Maintenon (1635-1719), dua edzino de la franca reĝo Ludoviko XIV.*

<sup>2</sup> *La ĝusta, de Hoffmann misskribita nomo estis Madelaine de Scudéry (1607-1701), siatempe ĉe la reĝa kortego ŝatata poetino.*

<sup>3</sup> *La romano en dek dikegaj volumoj pritraktas la sorton de la antikva romianino Cloelia, kiu perfuĝe savis sin antaŭ la perforto de la reĝo Porsenna.*

do timi ion de mizerulo, senprotektata, forlasita de la tuta mondo, persekutata, afliktata de monstra sorto, petegonta Vian fraŭlinon pri la savo el minacanta danĝero!“ La Martinière aŭdis, kiel la sube staranta ulo dirante tion ĝemis pro kortuŝa aflikto kaj singultis; dum tio la sono de lia voĉo estis tiu de junulo, mola, enpenetranta profunden en la bruston. Ŝi sentis sin plej interne emociata. Sen plu longe pripensi, ŝi iris por preni la ŝlosilaron.

Kiam ŝi apenaŭ estis malferminta la pordon, entrudis sin impete la per la mantelo cirkaŭvolvita figuro kaj irante preter La Martinière vokis frenezvoĉe en la koridoron: „Gvidu min al Via fraŭlino!“ Terurigite La Martinière levis la kandelington alten, kaj la trembrilo de la kandeloj lumigis morte palan, terure deformitan vizaĝon de junulo. Pro teruro La Martinière preskaŭ falis surteren, kiam la homo malfermis la mantelon kaj el la brustuko eliĝis la videbla tenilo de stileto. La homo paralizis ŝin kun fajron elĵetantaj okuloj kaj ankoraŭpli furioze ol antaŭe li kriis: „Gvidu min al Via fraŭlino, mi diris al Vi!“ Nun La Martinière vidis sian fraŭlinon en la plej proksima danĝero; ĉiu amo kontraŭ la ŝatata mastrino, en kiu ŝi adoris samtempe la pian, fidelan patrinon, ekflamis pli forte en ŝia internaĵo kaj kreis kuraĝon, pri kiu ŝi mem ne opiniis esti kapabla. Ŝi klakfermis rapide sian ĉambropordon, kiun ŝi estis lasinta malfermita, postenis sin antaŭ ĝi kaj parolis forte kaj firme: „Fakte, Via freneza konduto ĉitie en la domo konformas malbone al la mizeraj vortoj de tie ekstere, kiuj vekis mian kompaton je ege malĝusta tempo. Malpermesite Vi ne parolos nun al mia fraŭlino. Se Vi ne celas ion malbonan kaj ne devas kaŝi ion, revenu morgaŭ kaj prezentu Vian aferon!“ La homo eligis obtuzan ĝemon, gapis penetre kun terura rigardo al La Martinière kaj kaptis la stileton. La Martinière rekomendis interne sian animon al la Sinjoro, sed ŝi restis necedema kaj rigardis aŭdace rekte en la okulojn de la homo, dum ŝi premis sin pli firme al la ĉambropordo, kiun la homo devis trairi por atingi la fraŭlinon. „Lasu min al Via fraŭlino, mi postulas“, vokegis la homo ankoraŭfoje. - „Faru laŭ Via deziro“, respondis La Martinière, „mi ne cedos de ĉitio loko; ek, finu la mavan faron, kiun Vi komencis; ankaŭ Vi trovos la malgloran morton sur la Grèveplaco<sup>4</sup> same kiel Viaj malbenitaj komplicoj.“ - „Ho“, ekkriis la homo, „Vi pravas, La Martinière! Mi aspektas ja ... , ho jes, mi estas armita kiel abomena rabisto kaj murdisto, sed mi ne havas komplicojn verdiktajn, nek ekzekutitajn!“ - Kaj dirinte tion li eltiris la stileton, dum li ĵetis venenozajn rigardojn al la ĝismorte timigita virino. - „Jesuo!“ ŝi vokis atendante la mortigan puŝon; sed en ĉitio momento aŭdiĝis sur la strato la tintado de armiloj, la sono de hufotrapoj.

„La *Maréchaussée*<sup>5</sup> – la Maréchaussée. Helpon, helpon!“ kriis La Martinière. - „Terura virinaĉo, vi deziras mian pereon – nun ĉio finiĝis, ĉio finiĝis! prenu! - prenu; donu tion al la fraŭlino ankoraŭ hodiaŭ – morgaŭ, se vi volas“. Tion mallaŭte murmurante la homo estis fortirinta al la Martinière la kandelington, estinginta la kandelojn kaj preminta en ŝiajn manojn kesteton. „Pro via beateco, donu la kesteton al la fraŭlino“, vokis la homo kaj forfuĝis el la domo.

La Martinière estis sinkinta surteren, kun peno ŝi ekstaris kaj serĉis palpe la vojon trans la mallumo reen en sian ĉambron, kie ŝi tute elĉerpita kaj senpova por doni iun sonon, sinkis en sian apogseĝon. Nun ŝi aŭdis tinti la ŝlosilojn, kiujn ŝi estis lasinta en la seruro de la dompordo. La domo estis fermata kaj preskaŭ ne aŭdeblaj, malcertaj paŝoj proksimiĝis al ŝia ĉambro. Firmsorĉita, tro malforta por moviĝi, ŝi atendis la hororaĵon; sed kiel ŝi miris, kiam malfermiĝis la pordo kaj ŝi ekkonis ĉe la unua vido en la lumo de la nokta lampo la lojalan Baptiston. Tiu aspektis pala kiel mortinto kaj tute konfuzita. - „Pro ĉiuj sanktuloj“, li ekparolis, „pro ĉiuj sanktuloj, diru al mi, sinjorino Martinière, kio okazis? Aĥ la timo! la timo! - mi ne scias, kio tio estis, sed hieraŭ vespere ĝi pelis min per ĉiuj fortoj for el la edziĝfestoj. - Kaj nun mi venas en ĉitium straton. Sinjorino Martinière, mi pensas, havas delikatan dormon, certe ŝi aŭdos, kiam mi mallaŭte kaj singarde frapos al la dompordo, kaj enlasos min. Jen venas renkonte al mi forta patrolo, rajdistoj, infanteristoj, armitaj ĝis al la dentoj, kaj haltigas min kaj ne volas, ke mi pluiru. Sed feliĉe estas

<sup>4</sup> *placo por publikaj ekzekutoj en Parizo*

<sup>5</sup> *Marechaussee: la rajdanta policano*

inter ili Desgrais, la Maréchaussée-leŭtenanto. Kiu tre bone konas min; tiu diras, kiam ili tenas al mi la lanternon sub la nazon: `Hej, Baptisto, de kia vojo vi venas en la nokto? Vi devas nepre resti en la domo por gardi ĝin. Ĉitie ne estas sekurece, ni esperas atingi ankoraŭ ĉinokte bonan kaptajon.` Vi ne povas imagi, sinjorino Martinière, kiel tiuj vortoj falis sur mian koron. Kaj nun mi paŝas sur la sojlon, kaj jen vualita homo ĵetas sin el la domo, la elingigitan stileton en la mano, kaj kuregante ĵetas min teren – la domo estas malfermita, la ŝlosiloj troviĝas en la seruro – diru, kion signifas la tuto?`“

La Martinière, liberigita de sia angoro, rakontis, kiel ĉio okazis. Ambaŭ, ŝi kaj Baptisto, iris en la domkoridoro, ili trovis la kandelionon sur la planko, kien la fremdulo estis ĵetinta ĝin dum sia fuĝo. „Estas ja tute certe“, diris Baptiste, „ke nia fraŭlino estis prirabota kaj eble eĉ murdota. Tiu homo sciis, kiel Vi rakontas, ke Vi estis sola kun la fraŭlino, kaj eĉ, ke ŝi ankoraŭ maldormis super siaj skribaĵoj. Certe li estis unu el la malbenitaj friponoj kaj fiuloj, kiuj penetras en la internon de la domoj, per spionado ruze eltrovas ĉion, kio servas al ili por la entrepreno de siaj diablaj atakoj. Kaj la kesteton, sinjorino Martinière, tion, mi pensas, ni ĵetu en la Sejnnon, kie ĝi estas plej profunda. Kiu garantias, ke ne iu abomena malbonulo atencas la vivon de nia bona fraŭlino, ke ŝi malfermante la kesteton ne falos morta surteren kiel la olda markizo de Tournay, kiam li malfermis la leteron, kiun li estis ricevinta de nekonata mano!“

Post longa pripensado ambaŭ fideluloj fine interkonsentis rakonti ĉion je la sekvanta mateno al la fraŭlino kaj enmanigi al ŝi la misteran kesteton, kiu ja povus esti malfermata kun konvena singardo. Konsiderante ĉiun cirkonstancon de la apero de la suspekta fremdulo ambaŭ opiniis, ke eble povas subesti iu speciala mistero, pri kiu ili ne propraaŭtoritate decidu, sed ke ili devas lasi ties malkovron al sia mastrino.

La zorgoj de Baptisto bazis sur nerefutebla kaŭzo: Ĵus tiutempe Parizo estis la okazejo de plej abomenaj hororaĵoj, Ĵus tiutempe la diabla eltrovaĵo de la infero liveris por tio la plej facilajn rimedojn.

Glaser, germana apotekisto, la plej lerta kemiisto de sia tempo, okupiĝis, kiel ja kutime okazas ĉe homoj de lia scienco, pri alkemiaj<sup>6</sup> eksperimentoj. Li estis celinta la eltrovon de la Ŝtono de la Filozofoj<sup>7</sup>. Al li asociiĝis italiano kun la nomo Exili. Sed al tiu la orfara tekniko servis nur kiel preteksto. Sole la miksadon, kuiradon, sublimadon de la venenaj substancoj, per kiuj Glaser esperis atingi sian celon, li volis lerni, kaj finfine li sukcese preparis tiun fajnvenenon, kiu sen odoro, sen gusto mortigas parte senprokraste parte malrapide kaj ne postlasas iun ajn spuron en la homa korpo trompante ĉiun kapablecon, ĉiun sciencon de la kuracistoj, kiuj ne supozas la murdon per veneno kaj pro tio devas atribui la morton al iu natura kaŭzo.

Kiel ajn singarde Exili manipulis, li tamen suspektiĝis kiel vendanto de veneno kaj estas transportita al la *Bastille*<sup>8</sup>. En la saman ĉambron oni enkarcerigis iom pli poste la kapitanon Godin de Sainte Croix. Tiu estis vivinta kun la markizino de Brinvillier dum longa tempo en amrilato, kiu malfamigis la tutan familion kaj, ĉar la markizo restis indiferenta pri la krimoj de sia edzino, devigis ŝian patron, Dreux d'Aubrey, civileutenanton en Parizo, dispartigi la kriman paron per arestordono, kiun li atingis kontraŭ la kapitano. Tro emocia, sen karaktero, hipokrita piulo kaj ek de sia junaĝo inklina al ĉiaj malvirtoj, ĵaluza, ĝiskolere vengema, nenio al la kapitano povis esti pli bona ol la diabla sekreto de Exilis. Ĉar tio ebligis al li neniigi ĉiujn liajn malamikojn. Li iĝis la plej fervora disĉiplo de Exilis kaj baldaŭ egalas sian majstron tiel, ke li malliberigite, el la *Bastille* kapablis

<sup>6</sup> *La alkemio intencis krei valoran materialon el nevalora stato, dum la 17- kaj 18-a jarcentoj precipe oron el iu nevalora materio.*

<sup>7</sup> *latine „Lapis philosophorum“: mistera rimedo por gajni oron per purigado de nevalora materialo.*

<sup>8</sup> *Bastille: la urba fortreso de Parizo uzita kiel malliberejo, en la jaro 1790 malkonstruita.*

plulabori sole.

La Brinvillier estis dekadenca virino; per Sainte Croix ŝi iĝis megero. Li sukcese instigis ŝin, ke ŝi mortigu per veneno iom post iom unue sian propran patron, ĉe kiu ŝi vivis, flegante la oldulon kun abomena hipokriteco, poste siajn du fratojn kaj fine sian fratinnon, la patron pro venĝemo, la aliajn pro la riĉa heredaĵo. La historio de pluraj venenistoj montras la hororigan ekzemplon, ke tiaj krimoj iĝas nehaltigebla pasio. Sen specifa celo, pro pura plezuro venenmurdistoj ofte murdis personojn, kies vivo aŭ morto povis esti al ili tute egalaj. La subita forpaso de kelkaj malriĉuloj en la *Hôtel Dieu*<sup>9</sup> estigis pli poste la suspekton, ke la panoj, kiujn kutime la Brinvillier tie ĉiusemajne disdonis, por esti rigardata patrino de pieco kaj bonfarado, estis venenigitaj. Sed estas certe, ke ŝi venenigis kolombopasteĉojn kaj tiujn surtabligis al la gastoj, kiujn ŝi estis invitinta. La Chevallier du Guet kaj kelkaj aliaj personoj mortis viktimoj de tiuj inferaj manĝaĵoj. Dum longa tempo Sainte Croix, ties asistento La Chaussée, la Brinvillier sukcesis kaŝi siajn terurajn faraĉaĵojn per netravedebla vualo. Sed kiel ajn forta estas la abomena ruzo de fiaj homoj, la eterna potenco de la ĉielo estas decidinta kondamni la pekulojn jam ĉitie sur la tero!

La venenoj, kiujn Sainte Croix preparis, estis tiel subtilaj, ke, se la pulvoro (*poudre de succession*<sup>10</sup> nomis ĝin la parizanoj) dum la preparo restis aperta, unusola spiro sufiĉis por tujege sin mortigi. Pro tio Sainte Croix dum siaj manipuladoj portis maskon de fajna gazo. Iun tagon, kiam li ĵus estis verŝonta la pretan venenpulvoron en fiolon, tiuĉi masko falis malsupren kaj li spirante la subtilan pulvoron de la veneno sinkis sammomente morta teren.

Ĉar li estis mortinta sen heredantoj, la juĝejaj instancoj alrapidis por sigelfermi la postlasaĵon. Jen oni trovis la tutan en kesto ŝlositan infernan ilaron de la venenmurdo, pri kiu la malbenita Sainte Croix estis disponinta. Sed ankaŭ la leteroj de la Brinvillier estas trovitaj, kiuj ne lasis iujn dubojn pri ties nigrofaroj. Ŝi fuĝis al Lieĝo en monaĥejon. Degrais, oficisto de la Maréchaussée, estas postsendita al ŝi. Maskita kiel pastro li aperis en la monaĥejo, en kiu ŝi estis kaŝinta sin. Li sukcesis ekflirti kun la terurega virinaĉo kaj allogi ŝin al sekreta kunveno en soleca ĝardeno antaŭ la urbo. Apenaŭ alveninte, ŝi estas ĉirkaŭita far la sbiroj de Desgrais; la pastra amanto transformiĝis subite en la oficiston de la Maréchaussée kaj devigis ŝin eniri la ĉaron, kiu atendis antaŭ la ĝardeno kaj, ĉirkaŭita de la sbiroj ekveturis rekte al Parizo. La Chaussée estis jam pli frue senkapigita, la Brinvillier suferis la saman morton, ŝia korpo estas bruligita post la ekzekuto kaj la cindro disigita en la aeron.

La parizanoj ekspiris, kiam estis malaperinta el la mondo la monstro, kiu senpune kapablis direkti la mortigan armilon kontraŭ malamikon kaj amikon. Sed baldaŭ evidentiĝis, ke la terura fiarto de la malbeninda La Croix estis pluherediĝinta. Kiel nevidebla malica fantomo la murdo enŝteliĝis en la plej intimajn rilatojn, kiaj povas esti parenco, amrilato, amikeco, kaj ekkaptis firme kaj rapide la malfeliĉajn viktimojn. Tiu, kiun oni hodiaŭ estis vidinta en plena sano, paŝis la alian tagon ŝanceliĝe kiel kaduka malsanulo, kaj nenia lerto de la kuracistoj sukcesis savi lin de la morto. Riĉeco, enspeziga profesio, bela aŭ eble tro juna edzino – ĉio ĉi sufiĉis por la ĝismorta persekutado. La edzo timis tremante la edzinon, la patro la filon, la fratino la fraton. Netuŝitaj restis la manĝaĵoj, restis la vino ĉe la bankedo, kiun aranĝis la amiko por la amikoj, kaj kie alitempe estis reginta plezuro kaj ŝercado, serĉis terure timigitaj okuloj suspekteme la kaŝitan murdiston. Oni vidis familiestrojn aĉeti nutraĵojn en foraj regionoj kaj prepari ilin en tiu aŭ alia malpura aĉkuirejo timante en la propra domo diablan perfidon. Kaj malgraŭ tioĉi la plej granda, plej zorgema singardado estis kelkfoje vana.

---

<sup>9</sup> ĝis ĉirkaŭ la jaro 1600 la unusola malsanulejo de Parizo

<sup>10</sup> pulvoro de sukcedo, t. e. heredado

La reĝo, por kontraŭi la nigrofaradon pli kaj pli trooftiĝantan, instalas specialan kortumon, al kiu li komisiis la esploron kaj penadon de tiuj sekretaj krimoj. Tio estis la tiel nomata *Chambre ardente*<sup>11</sup>, kies membroj okazigis siajn kunsidojn malproksime de la Bastille kaj kiujn prezidis la Regnie<sup>12</sup>. Dum iom da tempo la klopodoj de Regnie, kiel ajn fervoraj ili eble estis, restis senfruktaj; al la ruza Degrais estis rezervita la sukceso, ke li malkovris la plej sekretan kaŝejon de la krimo. – En la antaŭurbo *Saint Germain*<sup>13</sup> loĝis oldulino, nomita La Voisin, kiu okupiĝis pri aŭgurado kaj ekzorcado kaj povis helpe de siaj komplicoj, Le Sage kaj Le Vigoureux, meti en timon kaj miregon eĉ personojn, kiujn oni ne nepre povas karakterizi feblaj kaj kredemaj. Sed ŝi faris pli ol tion: Estante adeptino de Exilis kaj de La Croix ŝi preparis same kiel tiuj la fajnan, senspuran venenon kaj tiamaniere helpis senhontajn filojn por atingi la fruan heredon, dekadencajn virinaĉojn por gajni pli junan edzon. Degrais penetris en ŝian sekreton, ŝi konfesis ĉion, la *Chambre ardente* kondamnis ŝin al la fajromorto, kiun ŝi suferis sur la Grèveplaco.

Oni trovis ĉe ŝi liston de ĉiuj personoj, kiuj estis servintaj sin de ŝia helpo; kaj tiel okazis, ke ne nur unu ekzekuto sekvis la alian, sed ke ankaŭ grava suspekto trafis eĉ personojn de alta renomo. Tiel oni kredis, ke la kardinalo Bonzy<sup>14</sup> estis trovinta ĉe la Voisin la rimedon por elimini en mallonga tempo ĉiujn personojn, al kiuj li kiel arkiepiskopo de Narbonne devis pagi pension. Same la dukino de Bouillon kaj la grafino de Soissons, kies nomojn oni estis trovinta sur la listo, estis akuzataj je la kontakto kun la diabla virino, kaj eĉ François Henri de Montmorenci, duko de Luksemburgo, altnobelulo kaj marŝalo de la imperio, ne evitis la persekutadon; ankaŭ lin persekutis la terura *Chambre ardente*. Li prezentis sin mem por la arestejo en la Bastille, kie la malamo de Louvois kaj La Regnie enkarcerigis lin en ses futojn longa malliberejo. Monatoj pasis, ĝis tute evidentiĝis, ke la sinteno de la duko ne povis tiri al si iun riproĉon. Li nur unufoje estis stariginta al si la horoskopon per Le Sage.

Estas certe, ke blinda fervoro delogis la prezidenton La Regnie al perfortaj batoj kaj kruelaĵoj. La tribunalo alprenis plene la karakteron de la Inkvizicio; la plej eta suspekto sufiĉis por rigora enkarcerigo, kaj ofte restis nur la hazardo, por pruvi la senkulpecon de la je morto akuzito. Krome Regnie estis de aĉa aspekto kaj malica naturo tiel, ke li baldaŭ tiris al si la malamon de tiuj, kies venĝanto aŭ protektanto li estis nomita. La dukino de Bouillon, dum la juĝa ekzameno pridemandata de li, ĉu ŝi estis vidinta la diablon, respondis: „Ŝajnas al mi, ke mi vidas lin ĉimomente.“

Dum nun sur la Grèveplaco la sango de kulpuloj kaj suspektitoj fluis torente kaj finfine la sekreta venenmurdado plirariĝis, montriĝis alispeca malbono, kiu estigis novan konsternon. Bando de friponoj ŝajne intencis havigi al si ĉiujn juvelojn. La riĉa ornamaĵo ĵus aĉetita, malaperis en nekomprenebla maniero, ĉu gardita kiel ajn. Ankoraŭ pli malbone estis, ke ĉiu, kiu riskis dum la vespera tempo porti ĉe si juvelojn, estis prirabata aŭ sur aperta strato aŭ en mallumaj stratetoj inter la domoj, ja estis eĉ murdata. Tiuj, kiuj estis savintaj sian vivon, deklaris, ke pugnoato sur la kapon falegis ilin kiel fulmo, kaj vekiginte el la senkonscio ili retrovis sin en tute alia loko ol tie, kie la batego estis trafinta ilin. La murditoj, kiuj preskaŭ ĉiun matenon kuŝis sur la strato aŭ en la domoj, havis ĉiuj la saman mortigan vundon, stiletpikon en la koron, laŭ la prijuĝo de la kuracistoj tiel rapide kaj celcerte mortigan, ke la vundito devis sinki teren sen iu ajn sono. Kiu ne apartenis al la luksa kortego de Ludoviko XIV., kiu ne, implikite en iu sekreta amrilato, kaŝiris je malfrua horo al la amantino kaj portis kelkfoje ĉe si riĉan donacon? - La friponoj, kvazaŭ ili estus asociitaj al fantomoj, sciis precize, kiam okazontus io ĉirilata. Ofte la malfeliĉulo ne atingis la domon, kie li

<sup>11</sup> *Ardanta ĉambro: speciala tribunalo por la persekutado de herezo kaj pervenenaj murdoj. La nomo devenas de la salono, kie la juĝistaro kunvenis kaj kies vandoj estis kovritaj per nigraj tuko tiel, ke ankaŭ dumtage oni lumigis ĝin per torĉoj.*

<sup>12</sup> *Misskribita de Hoffmann: Nicolas-Gabriel de La Reynie (1625-1709), organizanto de la Pariza polico.*

<sup>13</sup> *Saint-Germain-l'Auxerrois ĉe la maldekstra bordo de la Sejno vidalvide de la Louvre, tiam ankoraŭ antaŭurbe.*

<sup>14</sup> *Pierre, Cardinale de Bonsy (itale Bonzi, 1631-1703) estis ĉefepiskopo de Narbonne.*

esperis ĝui la plenumon de la amoro, ofte li mortfalis sur la sojlo, ja eĉ antaŭ la ĉambro de la amatino, kiu kun hororo trovis la sangokovritan kadavron.

Vane Argenson<sup>15</sup>, la policministro, ordonis aresti ĉiujn, kiuj el la popolo ŝajnis iamaniere esti suspektaj, vane furiozis La Regnie provante elpremi konfesojn, vane estis pliigataj la gardistoj, la patroloj, la spuroj de la krimfarintoj ne estis troveblaj. Nur la singardo, kun kiu oni armis sin ĝismente kaj lasis antaŭporti al si lumilon, helpis certgrade. Kaj tamen estadis ekzemploj, ke la servisto estis terurigata per ŝtonĵetoj kaj la mastro estis samtempe murdata kaj prirabata.

Strange estis, ke malgraŭ ĉiuj esploroj sur ĉiuj placoj, kieajn la komercado kun juveloj eblis, eĉ ne la pleja minimumo de la rabitaj valoraĵoj aperis kaj pro tio ankaŭ ĉitie neniu spuro montriĝis, kiu povintus esti sekvata. Degrais ŝaŭmis pro furiozo, ĉar la friponoj sukcesis fuĝi eĉ antaŭ lia ruzo. La urbokvartalo, en kiu li ĵus troviĝis, restis malĝenata, dum en la alia, kie neniu supozis ian malbonon, la rabomurdado trafis siajn riĉajn viktimojn.

Degrais elpensis la artefikon, krei plurajn Degraisojn, tiel similajn unu al la alia laŭ irmaniero, korpoteno, artikulado, figuro, vizaĝo, ke eĉ la sbiroj ne sciis, kie estis la vera Degrais. Dume li, riskante sian vivon, atente ĉirkaŭaŭskultis en la plej sekretaj kaŝejoj kaj sekvis de malproksime tiun aŭ alian, kiu laŭ lia instigo portis ĉe si riĉan ornamaĵon. Sed tiuĉi restis nemolestata; sekve ankaŭ pri tiuĉi praktiko la kanajloj estis informitaj. Degrais falis en malesperon.

Iun matenon Desgrais venas al la prezidento La Regnie, pala, deformita, furiozita. – „Kion vi havas, kiajn novaĵojn? Ĉu vi trovis la spuron?“ alvokis lin la prezidento. – „Ho, sinjora moŝto“, Desgrais ekbalbutas pro furiozo, „ho, sinjora moŝto – hieraŭ nokte – proksime de la Louvre<sup>16</sup> la markizo de La Fare estas atakita, en mia ĉeesto.“ – „Je ĉielo kaj tero“, ekzaltis La Regnie pro ĝojo – „ni havas ilin!“ – „Ho, tamen aŭskultu“, Degrais kontraŭdiras kun amara rideto, „auskultu nur antaŭe, kiamaniere ĉio okazis – . Apud la *Louvre*<sup>16</sup> mi do staras kaj atendas, la tutan infernon en mia brusto, la diablojn, kiuj primokas min. Jen figuro pretervenas dense apud mi kun incerta paŝado, ĉiam rigardante malantaŭen kaj sen vidi min. En la brileto de la luno mi ekkonas la markizon de La Fare. Mi povis atendi lin tie, ĉar mi ja sciis, kien li iris tiel kaŝe. Li estis apenaŭ dek-dekkvin paŝojn preter mi, jen iu figuro kvazaŭ elsaltanta el la tero, bategas lin teren kaj ĵetas sin sur lin. Senpripense, surprizita de la momento, kiu povis liveri la murdiston en mian manon, mi laŭte ekkriis kaj volas el mia kaŝejo forte alsalti lin, tiam mi implikiĝas en mia mantelo kaj falas teren. Mi vidas la homon forkuregi kvazaŭ per flugiloj de la vento; mi kolektas min haste de sur la tero, postkuras lin – kurante mi blovas mian kornon – de malproksime respondas la fajfiloj de la sbiroj – iĝas bruo – tinto de armiloj, hufofrapado el ĉiuj direktoj. `Ĉitien – ĉitien – Degrais – Degrais!` mi krias tiel, ke eĥiĝas tra la stratoj. – Ĉiam mi vidas la homon en la hela lunbrilo, kiel li, por trompi min, ĉiam en tiun aŭ alian direkton deflankiĝas. Ni venas en la straton Nicaise<sup>17</sup>; tiam liaj fortoj ŝajnis febliĝi, mi streĉas duoble la miajn – nun li estas nur je dekkvin paŝoj antaŭ mi.“ – „Vi atingas lin – Vi kaptas lin, la sbiroj alkuras“, vokas La Regnie fulmokule, dum li kaptas la brakon de Desgrais, kvazaŭ ĉi tiu estus la fuĝanta murdisto mem. – „Dek kvin paŝojn“, Degrais daŭrigas kun obtuza voĉo kaj spirante kun peno, „dekkvin paŝojn antaŭ mi la homo saltas en la ombbron kaj malaperas tra la muro.“ – „Malaperas tra la muro? – Ĉu Vi frenezas?“, vokas La Regnie retiriĝante du paŝojn kaj kunfrapante la manojn. – „Nomu min“, daŭrigas Desgrais frotante sian frunton kiel iu, kiun malbonaj fantomoj turmentas, „nomu min, sinjora moŝto, kiel vi volas, furiozanto, stulta fantomvidanto, sed ne estas alie ol kiel mi rakontas tion al Vi. Rigidiĝinte mi staras antaŭ la muro, kiam pluraj sbiroj alvenas senspire, kun ili la markizo de La Fare, kiu estis

<sup>15</sup> *Marc René de Paulmy, markizo d'Argenson, (1652-1721) sekvis al La Reynier kiel leutnant de la polico.*

<sup>16</sup> *Kastelo de la francaj reĝoj, poste publika muzeo.*

<sup>17</sup> *Strato, kiu hodiaŭ ne plu ekzistas inter la Louvre kaj la strato St. Honoré.*

kolektinta siajn fortojn, la elingigitan spadon enmane. Ni ekbruligas la torĉojn, paŝas tien kaj reen serĉe palpante la muron: neniuj spuro de pordo, de iu fenestro, de aperturo. Estas solida ŝtona kortmuro, kiu sin apogas kontraŭ domon loĝatan de homoj, kontraŭ kiuj ne estiĝas la plej malgranda suspekto. Ankoraŭ hodiaŭ mi ĉion skrupule inspektis. La diablo mem estas, kiu mistifikas nin.“

La rakonto de Desgrais iĝis konata en Parizo. La kapoj estis plenaj de sorĉaĵoj, ekzorcismoj, diablaj aliancoj de la Voisin, de la Vigoreux, de la fifama sacerdoto Le Sage; kaj kiel estas eco de nia ĉiama naturo, ke la inklino al la supernaturaĵo, al la miraklo venkas ĉion racian, tiel oni kredis nenion alian ol ke, kion Desgrais estis nur ĉagrene eldirinta, la diablo persone protektas la malbenitojn, kiuj estis vendintaj al li siajn animojn. Oni povas imagi, ke la rakonto de Desgrais ricevis kelkspecan aldonaĵon. La historieto pri tio kun lignogravuraĵo supre prezentanta abomenindan figuron de la diablo, kiu antaŭ la terurigita Desgrais sinkas en la teron, estis presata kaj vendata ĉiuloke. Tio sufiĉis por timigi la popolamason kaj eĉ ege malkuraĝigi la sbirojn, kiuj nun dumnokte traeraris la stratojn kun tremo kaj timo garnitaj kun amuletoj kaj tute aspergitaj per sankta akvo.

Argenson vidis, ke la penado de la *chambre ardente* fiaskas, kaj turnis sin al la reĝo, ke tiu por la nova krimo instalu tribunalon, kiu kun ankoraŭ pli ampleksa forto sekvu la malbonfarantojn kaj punu ilin. La reĝo, konvinkite, ke li estis doninta jam tro multe da potenco al la *chambre ardente*, afekciite per la teruraĵo de sennombraj ekzekutoj, kiujn la sangavida La Regnie estis ordoninta, tute rifuzis la proponon. Sekve oni elektis alian rimedon por gajni la reĝon por la afero.

En la salonoj de la Maintenon, kie la reĝo posttagmeze kutimis restadi kaj eble ankaŭ labori kun siaj ministroj ĝis la malfrua nokto, oni transdonis al li poemon en la nomo de endanĝerigitaj amantoj, kiuj plendis, ke ili, se postulas la galanteco porti al la amatino riĉan donacon, devas ĉiam riski sian vivon. Ŝpruciĝi sian sangon por la amatino en interkavalira batalo, sed tute alia estas la afero rilate al la malica atako de murdisto, kontraŭ kiu ne eblas armi sin. Ludoviko, la fulmanta polusa stelo de ĉiu amoro kaj galanteco, tiu bonvolu hele ekradiante disĵeti la malluman nokton kaj tiamaniere malkovri la nigran misteron en ĝi enhavatan. La dia heroo, kiu frakasis siajn malamikojn, ankaŭ nun elingigu sian venke brilegantan glavon kaj kiel Herkulo la serpenton de Lernejo, kiel Teseo la Minotaŭron<sup>18</sup> kontraŭbatalu la minacan monstron, kiu estingas ĉiun amoran ĝojon kaj transformas ĉiun gajecon en profundan suferon, en nekonsoleblan funebron.

Kiel ajn malhumura la afero estis, tamen ne mankis al tiu poemo spritaj, ŝercaj parolturnoj aparte en la priskribo, kiel la amantoj devas senti timon dum ilia kaŝa irado al la amatino, kiel la angoro jam mortigas ĉian amoran volupton, ĉiun ĝermantan belan aventuron de galanteco. Ĉar krome aldoniĝis, ke je la fino ĉioĉi rezultis en bombasta panegiro<sup>19</sup> pri Ludoviko XIV., ne estis eviteble, ke la reĝo tralegis la poemon kun videbla plezuro. Finleginte ĝin li sen igi la okulojn for de la papero turnis sin rapide al la Maintenon, legis laŭtvoĉe ankoraŭfoje la poemon kaj tiam demandis kun ĉarma rideto, kiel ŝi prijuĝas la dezirojn de la endanĝerigitaj amantoj. La Maintenon, laŭ sia serioza karaktero kaj ĉiam kun la mieno de certa pieco, respondis, ke sekretaj malpermesitaj vojoj ne valoras specialan protektadon, sed la teruraj krimuloj certe meritas rimedojn por ilia ekstermado. La reĝo, malkontenta pro tiu nedecidema respondo, faldis la paperon kaj volis reeniri al la ŝtatssekretario, kiu laboris en la alia ĉambro, kiam, dum li vidis flanken, la Scuderi falis en liajn okulojn, kiu ĉeestis kaj estis ĵus sidiĝinta proksime al la Maintenon sur malgranda apogseĝo. Tiun li nun alpaŝis; la ĉarma rideto unue reginta ĉirkaŭ la buŝo kaj la vangoj, sed poste malaperinta, gajnis denove la superecon, kaj starante tute proksime antaŭ la fraŭlino kaj denove malfaldante la poemon li milde parolis: „La

<sup>18</sup> *Herkulo: antikgreka heroo, kiu mortigis la Hidron (Hydra), serpenton kun naŭ kapoj, vivaĉantan en marĉa tereno; Teseo: li ekstermis la monstron Minotaŭron en la labirinto de la insulo Kreto kaj savis tiel la vivon de dekkvar geknaboj.*

<sup>19</sup> *Panegiro estas ekzaltita laŭdado.*

markizino absolute rifuzas ekscii ion pri la galantaĵoj de niaj enamiĝintaj sinjoroj kaj evitas respondi min en malpermesita maniero. Sed Vi, mia fraŭlino, kiel Vi prijuĝas ĉiun peticion?“ – La Scuderi ekstaris respektplene de sia apogseĝo, fuĝema ruĝo superflugis kiel vespera purpuro la palajn vangojn de la maljuna nobla sinjorino; ŝi diris delikate klinante sin kun okuloj mallevataj teren:

„*Un amant qui craint les voleurs,  
n'est point digne d'amour.*“<sup>20</sup>

La reĝo, tute surprizita pro la kavalireca spirito de tiuj malmultaj vortoj, kiuj batis teren la tutan poemon kune kun ties longegaj tiradoj<sup>21</sup>, kriis fulmokule: „Ĉe la sankta Dionizio, Vi pravas, fraŭlino! Neniu blinda regulo, kiu trafas la nekulpulon same kiel la kulpulon, protektu la malkuraĝecon; do Argenson kaj La Regnie plenumu siajn taskojn!“

Nun la Martinière priskribis ĉiujn hororaĵojn de la tempo kun plej vivaj koloroj, kiam ŝi je la alia mateno rakontis al sia fraŭlino, kio estis okazinta en la antaŭa nokto, kaj kun tremo kaj timo ŝi transdonis al ŝi la misteran kesteton. Kaj ŝi kaj Baptisto, kiu tute pala staris en la angulo kaj pro angoro kaj korpremo knedante la noktoĉapon per la manoj preskaŭ ne sukcesis paroli, petis plej triste la fraŭlinon je ĉiuj sanktuloj, ke ŝi malfermu la kesteton kun laŭeble plej granda atentemo. La Scuderi pesante kaj pruvante la fermitan misteron en la mano diris ridetante: „Vi ambaŭ vidas fantomojn! Ke mi ne estas riĉa, ke ĉe mi nenio trezoroj estas depreneblaj, kiuj valorus murdon, tion scias same bone kiel mi kaj vi la abomenindaj murdistoj tie ekstere, kiuj, kiel vi mem diras, spionas la plejan internon de la domoj. Estas celate al mia vivo, ĉu? Kiu povas havi intereson pri la morto de persono sepdek tri jarojn aĝa, kiu neniam persekutis aliajn ol la malbonulojn kaj malpacigulojn en la romanoj, kiujn ŝi mem verkis, kiu faras mezkvalitajn versojn, kiuj povas eksciti nenies envion, kiu postlasos nenion ol la tualeton de la maljuna fraŭlino, kiu de tempo al tempo iris al la kortego, kaj kelkajn dekojn da bone binditaj libroj kun orumitaj tranĉfacoj. Kaj kvankam vi, Martinière, intencas kiel ajn terurige priskribi la aperon de la fremdulo, mi ne povas kredi, ke li celis ion malbonan. Sekve ...!“

La Martinière repuŝiĝis tri paŝojn, Baptisto preskaŭ sinkis kun kvazaŭ sufokita „aĥ!“ sur la genuojn, kiam la fraŭlino premis elstarantan ŝtalan butonon kaj la kovrilo de la kesteto kiksone malfermiĝis.

Kiel ekmiris la fraŭlino, kiam brilegis antaŭ ŝi paro da oraj, riĉe kun juveloj ekipitaj braceletoj kaj samspeca ĉirkaŭkola ornamaĵo. Ŝi elprenis la juvelaron kaj dum ŝi laŭdis la belegan produkton, la Martinière okulumis la riĉajn braceletojn ĉiam denove kriante, ke eĉ la vanta Montspan<sup>22</sup> ne posedas tiajn ornamaĵojn. „Sed al kio ĉi tio estas destinita, kion signifas tio“, diris la Scuderi. Ĉimomente ŝi rimarkis sur la fundo de la kesteto malgrandan kunfalditan slipon. Prave ŝi esperis trovi sur ĝi la klarigon de la mistero. La slipo, apenaŭ ŝi estis leginta ĝin, falis el ŝiaj tremantaj manoj. Ŝi sendis signifoplenan rigardon ĉielen kaj tiam resinkis duone sveninta en la apogseĝon. Ektimigite la Martinière helpe alkuris al ŝi, alkuris Baptisto. „O“, ŝi nun kriis kun pro larmoj duone sufokita voĉo, „o, la granda hontigo! Ĉu tio devas okazi al mi ankoraŭ en la alta aĝo! Ĉu mi per stulta frivoleco pekis kiel senpripensema junulino? Ho dio, ĉu vortoj kvazaŭ ŝerce haste diritaj valoras tian teruran interpretadon? Ĉu la krimo rajtas akuzi min, kiu ek de la infanaĝo restadis fidela al la virto kaj al la senriproĉa pieco, je la diabla alianco?“

La fraŭlino tenis la naztukon antaŭ la okuloj vehemente larmante kaj plorĝemante tiel, ke la Martinière kaj Baptisto en sia granda konfuzo kaj korpremateco ne sciis, kiel helpi al sia bona

<sup>20</sup> „*Amanto, kiu timas la ŝtelistojn, ne valoras la amon.*“

<sup>21</sup> *Tirado: bombasta parolmaniero*

<sup>22</sup> *Françoise Athenaïs de Rochechouart, Marquise de Montspan (1641-1707), amatino de la reĝo*



mastrino en ties granda doloro.

La Martinière estis plukinta la slipon de la tero. Sur tiu legeblis:

*„Un amant qui craint les voleurs,  
n'est point digne d'amour.*

*Via sagaca intelekto, altestimata sinjorino, savis nin de granda persekutado, kiuj plenumas la rajton de la pli fortaj kontraŭ la malforteco kaj poltrono kaj alpropriigas al ni trezorojn, kiuj maldigne disipotis. Alprenu afable ĉitium ornamaĵon kiel pruvon de nia danko! Estas la pleja valorajo, kiun ni sukcesis gajni dum longa tempo, kvankam, estimata sinjorino, multe pli bela juvelaro devus ornami Vin ol ĉitiu ĵus estas. Ni petas, ke Vi ne reprenu de ni Vian amikecon kaj Vian favoran rememoron. – La Nevidelblaj.“*

„Ĉu estas eble“, kriis la Scuderi, kiam ŝi sufiĉe estis kolektinta siajn fortojn, „ĉu estas eble, ke oni povas ĝis al tioma grado peli la senhontan impertinecon, la malbenitan mokon?“ - La suno brilis hele tra la fenestraj kurtenoj el ruĝa silko kaj tiel okazis, ke la brilantoj, kiuj kuŝis sur la tablo apud la malfermita kesteto, ekfulmetis en ruĝeca brileto. Rigardante al ili la Scuderi pro hororo vualigis sian vizaĝon kaj ordonis al la Martinière, ke ŝi senprokraste forportu la teruran juvelaron, al kiuj gluiĝas la sango de la murditoj. La Martinière, postkiam ŝi estis tuj enŝlosinta la ĉirkaŭkolan ornamaĵon kaj la braceletojn en la keston, rimarkis, ke estas verŝajne plej konsilinde transdoni la juvelojn al la policministro kaj informi lin, kiamaniere ĉio okazis koncerne la timigan aperon de la juna homo kaj la transdono de la kesteto.

La Scuderi leviĝis kaj iris silente tien kaj reen en la ĉambro kvazaŭ ŝi cerbumis, kio estus farenda. Tiam ŝi ordonis al la Baptisto, ke li iru por preni palankenon, kaj al la Martinière, ke tiu vestu ŝin, ĉar, kiel ŝi diris, ŝi tuj volas atingi la markizon de Maintenon. Ŝi portigis sin al la markizino ĵus je la sama horo, kiam tiu, kiel la Scuderi sciis, troviĝis sola en siaj ĉambroj. La kesteton kun la juveloj ŝi prenis kun si.

La markizino devis vere miri, kiam ŝi vidis, ke la fraŭlino, kiu aliokaze estis la digneo, ja spite al ŝia progresinta aĝo la amindeco, la ĉarmo mem, eniris pale, deformite, kun ŝanceliĝantaj paŝoj. „Kio ĉe ĉiuj sanktuloj okazis al Vi?“ ŝi vokis kontraŭ la kompatinda timigita sinjorino, kiu estis ekster si, preskaŭ ne kapabla, teni sin rekte kaj provis laŭeble rapide atingi la apogseĝon, kiun la markizo alŝovis al ŝi. Finfine estante parolkapabla la fraŭlino rakontis, kian profundan, ne eltenindan ofendon tiu nepripensita ŝerco altiris al ŝi, per kiu ŝi estis respondinta la petskribon de la endanĝerigitaj amantoj. La markizo, post kiam ŝi iom post iom estis ekkoniĝinta ĉion, decidis, ke la Scuderi tro multe afliktiĝas pro la stranga okazaĵo, ke la moko de la malbenita kanajlaro neniam povus trafi pian, noblan koron, kaj fine petis, ke ŝi rajtu rigardi la ornamaĵon.

La Scuderi transdonis al ŝi la malfermitan kesteton, kaj la markizino ne sukcesis reteni laŭtan ekkrion de miro. Ŝi elprenis la kolĉenon, la braceletojn kaj paŝis kun tiuj al la fenestro, kie ŝi nun igis ludeti la juvelojn en la sunbrilo, nun tenis la gracilan oran verkon tre proksime antaŭ la okuloj nur por ekvidi, per kia mirakla arto ĉiu hoketo de la interplektitaj ĉenoj estis farita.

Subite la markizo returnis sin rapide al la fraŭlino kaj vokis: „Ĉu Vi eble scias, fraŭlino, ke ĉitiajn braceletojn, ĉitian ornamaĵon por la kolo neniu alia povas esti farinta ol René Cardillac?“ – Tiutempe René Cardillac estis la plej lerta oraĵisto en Parizo, unu el la plej artospertaj kaj same strangaj homoj de sia tempo. Kun iom malpli granda korpo ol inverse, sed larĝsultra kaj kun forta, muskola staturo Cardillac, progresinta alten en la kvindek vivjarojn, havis ankoraŭ la fortecon, la moveblecon de junulo. Pri ĉi tiu forteco, karakterizinda kiel nekutima, atestis la densa, krispa, ruĝeca hararo kaj la kompakta akre brilanta vizaĝo. Se Cardillac ne estintus konata en tuta Parizo

kiel la plej leĝokonforma honestulo, malegoisma, sincera, ĉiam helpema, lia tute speciala rigardo el profundigintaj, verde scintilantaj okuloj farintus lin suspektinda pro kaŝita perfideco kaj maliceco.

Kiel dirite, Cardillac estis en sia arto la plej lerta ne nur en Parizo, sed eble entute de sia tempo. Tre profunde konanta la naturon de la gemoj, li kapablis prilabori kaj munti ilin tiamaniere, ke la juvelaro, kiun oni antaŭe estis pritaksinta modesta, eliris el la metiejo de Cardillac en brila splendo. Ĉiun mendon li transprenis kun ardanta avido kaj postulis prezon, kiu, kiel ajn malgranda ĝi estis, ne ŝajnis esti kongrua al la verko. Poste la verko ne lasis al li trankvilon, dumtage kaj nokte oni aŭdis lin marteladi, kaj ofte, kiam la laboro estis finiĝinta, subite malplaĉis al li la formo, li dubis pri la gracileco de iu muntaĵo de la juveloj, de iu malgranda hoketo – sufiĉe la surpriza kaŭzo por ĵeti la tutan verkon en la fandokaldronon kaj por eklabori denove. Tiamaniere la verko iĝis pura, nesuperebla majstraĵo, kiu surprizigis la mendinton. Sed nun preskaŭ ne eblis ricevi de li la pretan verkon. Sub mil pretekstoj li atendigis la mendinton de unu semajno al alia, de unu monato al alia. Sensukcese oni ofertis al li la duoblon por la laboraĵo, li rifuzis preni eĉ unu Louizon<sup>23</sup> pli ol la interkonsentitan prezon. Kiam li finfine devis cedi al la impeto de la mendinto kaj eldoni la ornamaĵon, li ne povis defendi sin kontraŭ ĉiuj simptomoj de plej profunda ĉagreno, ja eĉ de interne de li bolanta kolero. Se li estis devinta transliveri pli gravan, aparte riĉan verkon, eble multajn milojn kosten pro la altvaloreco de la juveloj, pro la pli ol gracila orlaboraĵo, li povis kvazaŭ freneze kuri tien kaj reen abomenante sin, sian laboron, ĉion ĉirkaŭe. Sed kiam iu postkuris lin kaj laŭte kriis „René Cardillac, ĉu Vi ne ŝatus fari belan kolornamaĵon por mia fianĉino, braceletojn por mia knabino kaj tiel plu“, tiam li subite haltis, alrigardis tiun kun siaj fulmetantaj malgrandaj okuloj kaj demandis frotante la manojn: „Kion Vi havas por komisi?“ La aliulo eltiras skatoleton dirante: „Jen estas juveloj, tre valoraj ili ne estas, nur ĉiutaga materialo, sed en Viaj manoj ...“, Cardillac ne lasas lin finparoli, perforte forŝiras la skatoleton el liaj manoj, elprenas la juvelojn, kiuj vere ne estas tre valoraj, tenas ilin kontraŭ la lumo kaj elvokas plena de entuziasmo: „Ho, ho – ĉu ĉiutaga materialo? Tute ne! – Belaj ŝtonoj, lasu min nur agi, kaj se Vi riskas ankoraŭ manplendon da Louizoj, mi volas enmeti ankoraŭ kelkajn ŝtonetojn, kiuj briletu en Viajn okulojn kiel la kara suno mem.“ – Tiu parolas: „Mi lasas ĉion al Vi, majstro René, kaj pagos, kiom Vi postulos!“ Sen iu diferenco, ĉu tiu estas riĉa civitano aŭ nobela sinjoro de la kortego, Cardillac ĵetas sin temperamente al lia kolo, premas kaj kisas lin kaj diras, ke li denove estas tute feliĉa kaj post ok tagoj la verko estos preta. Li rapidegas salte-senhalte hejmen en sian metiejon kaj komencas martelegi, kaj post ok tagoj la majstroverko estas realigita.

Sed kiam tiu, kiu mendis ĝin, venas por pagi kun ĝojo la postulitan malgrandan sumon kaj deziras kunpreni la pretan ornamaĵon, Cardillac iĝas ĉagrena, malĝentila kaj obstina.“ – „Sed majstro Cardillac, konsideru, morgaŭ estos mia edziĝfesti.“ – „Via edziĝfesti absolute ne jukas min; informiĝu denove post du semajnoj.“ – „La ornamaĵo estas preta, jen kuŝas la mono, mi nepre bezonas ĝin.“ – „Kaj mi diras al Vi, ke mi devas ankoraŭ modifi kelkajn detalojn en la ornamaĵo kaj ke mi hodiaŭ ne transdonos ĝin.“ – „Kaj mi diros al Vi, ke, se Vi ne bonvole transdonos la ornamaĵon, por kiu mi eĉ pagos la duoblon al Vi, Vi vidus min tuj alveni kun la servemaj satelitoj de Argenson.“ – „Nu, tiam turmentu Vin la Satano per cent ardantaj tenaĵoj kaj pendigu tri funtocentojn al la kolĉeno, por ke ĝi mortstrangolu Vian fianĉinon!“ – Kaj post tio Cardillac ŝtopas la ornamaĵon al la fianĉo en ties brustsakon, kaptas lin ĉe la brako, elĵetas lin el la ĉambropordo tiel, ke li falas brue malsupren laŭ la tuta ŝtuparo, kaj ridas el la fenestro kiel la diablo vidante la mizeran junulon, kiu, la snuftukon antaŭ la sanganta nazo, ellamas el la domo.

Tute ne klarigeble estis ankaŭ, ke Cardillac, kiam li estis entuziasme transpreninta iun laboron, subite petegis la mendinton kun ĉiuj simptomoj de plej interne ekscitita emocio, kun plej kortuŝaj vortoj, eĉ ĝemante kaj plorante, je la virgulino kaj ĉiuj sanktuloj, por ke li rezignu pri la komencita verkaĵo. Unu aŭ alia el la de la reĝo, de la popolamaso plej altestimataj personoj estis vane ofertinta

---

<sup>23</sup> *Louis d'or estis ora monero stampita kun la bildo de la reĝo Louis (Ludoviko)*

grandajn sumojn por ricevi de Cardillac eĉ nur la plej malgrandan verkaĵon. Li ĵetis sin antaŭ la piedojn de la reĝo kaj insiste petis la gracon, ke li rajtu verki nenion por li. Same li malakceptis ĉiun mendon de la Maintenon, li eĉ rifuzis kun la esprimo de abomeno kaj hororo ties peton fari al ŝi malgrandan, kun la emblemoj de la arto ornamitan ringon, kiun Racine<sup>24</sup> estus ricevanta de ŝi.

„Mi vetas,“ diris pro tio la Maintenon, „mi vetas, ke Cardillac, se mi sendas iun al li por minimume ekscii, por kiu li produktis tiun ornamaĵon, rifuzas veni ĉitien, ĉar li eble timas iun mendon kaj tamen absolute ne volas ion verki por mi. Kvankam li de kelka tempo ŝajnas fini sian obstinecon, ĉar, kiel mi aŭdas, li nun laboras pli fervore ol iam antaŭe kaj elmanigas sian verkaĵon senprokraste, sed ankoraŭ ĉiam kun profunda ĉagreno flankenturnante la vizaĝon.“

La Scuderi, al kiu estis tre grave, ke, se ankoraŭ eble, la ornamaĵo venu en la manojn de la legitima posedanto, rimarkis, ke oni ja povus tujege diri al la strangulo, ke oni ne postulos iun verkon de li, sed ke li esprimu nur sian opinion pri iuj juveloj. Tion aprobis la markizino. Estis sendate al Cardillac, kaj kvazaŭ li estis jam survoje, li post mallonga tempo eniris la ĉambron. Ekvidante la fraŭlinon de Scuderi, li ŝajnis esti embarasita samkiel iu subite konsternita, kiu estas frapita de io ne atendita, forgesas la aktualajn postulojn de la ĝentileco, riverencis unue respektoplene antaŭ tiu honorinda sinjorino kaj nur tiam turnis sin al la markizino. Tiu haste demandis lin montrante al la juvelaro, kiu briletis sur la malhelverde kovrita tablo, ĉu tio estas lia verko. Cardillac, apenaŭ direktinte la okulojn sur ĝin, pakis rapide, dum li fiksrigardis en la vizaĝon de la markizino, la braceletojn kaj la kolĉenon en la apude starantan kesteton kaj vehemente forŝovis ĝin de si. Nun li diris, dum aĉa rideto akre brilis sur lia ruĝa vizaĝo: „Efektive, madamo markizino, oni devus malbone koni la verkaĵaron de Cardillac, se oni nur unu momenteton kredus, ke iu ajn alia oraĵisto en la mondo povas munti tian ornamaĵon. Certe ja estas tio mia verko.“ – „Do diru“, daŭrigis la markizino, „por kiu Vi faris ĉitium ornamaĵon.“ – „Por mi tute sola“, respondis Cardillac, kaj li daŭrigis, kiam ambaŭ, la Scuderi kaj la Maintenon, alrigardis lin tute mirigitaj, tiu plena de malfido, ĉitium plena de timema ekspekto, kiel nun turniĝos la afero, „nu, eble Vi opinias tion stranga, madamo markizino, sed tio estas tia. Nur pro la bela laboro mi kunserĉis miajn plej bonajn ŝtonojn kaj kun ĝojo pri ili mi laboris pli diligente ol iam. Antaŭ kelkaj tagoj la ornamaĵo malaperis el mia metiejo en neklarigebla maniero.“ – „Dankon al la ĉielo“, vokis la Scuderi, dum ŝiaj okuloj briletis pro ĝojo kaj ŝi rapide kaj vigle kiel juna knabino saltis el sia apogseĝo, iris kontraŭ Cardillac kaj metis ambaŭ manojn sur liajn ŝultrojn, „rericevu“, ŝi tiam diris, „rericevu, majstro René, la propraĵon, kiun malbenitaj friponoj forrabis de Vi.“

Nun ŝi rakontis detale, kiel ŝi estis ricevinta la ornamaĵon. Cardillac silente aŭskultis ĉion kun mallevitaj okuloj. Nur kelkfoje li ekĝemis malkompreneble „hm! – ehe! – ej! – hoho!“ kaj jen metis la manojn dorsen, jen karesis silente mentonon kaj vangon. Kiam nun la Scuderi estis fininta, ŝajnis, kiel Cardillac luktus kun specialaj pensoj, kiujn li intertempe estis kaptinta, kaj same kvazaŭ ia decido kontraŭus la realiĝon kaj progreson. Li frotis sian frunton, li ĝemis, li viŝis al si la okulojn per la mano eble por rebati ekaperantajn larmojn. Finfine li ekprenis la kesteton, kiun la Scuderi etendis al li, sinkis malrapide sur la genuojn kaj diris: „Al Vi, honorinda fraŭlino, la fatalo destinis ĉitium ornamaĵon. Jes-ja nur nun mi scias, ke mi farante ĝin pensadis pri Vi, je eĉ verkis por Vi. Ne malakceptu kaj ne rifuzu porti ĉitium ornamaĵon, la plej bonan, kiun mi kreis ek de longa tempo.“ – „Ej, ej“, respondis la Scuderi ŝercante kun ĉarmo, „kion Vi pensas, majstro René, ĉu decas al mi en mia aĝo ornamo min per brilaj ŝtonoj? – Kaj kial Vi intencis fari al mi tiom riĉan donacon? Ho, ho, majstro René, se mi estus bela kiel la markizino De Fontange<sup>25</sup> kaj riĉa, fakte mi ne lasus la ornamaĵon el la manoj; sed al kio servu ĉitium vana pompo sur miaj velkaj brakoj, la briletanta galanterio ĉirkaŭ la vualita kolo?“ – Intertempe Cardillac estis ekstarinta kaj diris kvazaŭ tute ekster si kun konfuza rigardo, dum li sen interrompo prezentis la kesteton al la Scuderi: „Kompату min,

<sup>24</sup> Jean Racine (1639-1699): *Tiutempe la plej ŝatata franca poeto, kiu verkis famkonatajn tragediojn.*

<sup>25</sup> Marie-Angelique de Scoraille de Roussille (1661-1681) estis dukino de Fontanges kaj famkonata belulino

fraŭlino, kaj prenu la ornamaĵon. Vi ne povas kredi, kian profundan estimon mi sentas en mia koro pro Via virto, pro Viaj altaj meritoj. Prenu do mian malgravan donacon nur pro mia klopodo, ke mi pruvu al Vi mian plej internan pensadon!“ – Kiam nun la Scuderi ankoraŭ hezitis kaj hezitadis, prenis la Maintenon la kesteton el la manoj de Cardillac dirante: „Ho, pro la ĉielo, fraŭlino, Vi ĉiam parolas pri Via alta aĝo; kiom ĝenas nin, min kaj Vin, la jaroj kaj ties ŝarĝo! Kaj ĉu Vi ne kondukas kiel sinĝena junulino, kiu volonte dezirus ekpreni la ofertitan dolĉan frukton, se tio okazus sen mano kaj fingroj? Ne rifuzu al la brava majstro René ricevi kiel donacon, kion mil aliaj ne povas akiri, senkonsidere de ĉiu oro, ĉiu petado kaj petego.“

Intertempe la Maintenon estis altrudinta la kesteton al la Scuderi, kaj nun Cardillac ĵetis sin sur la genuojn, kisis la jupon de la Scuderi, la manojn, ĝemis, suspiris, larmis, plorĝemis, eksaltis, forkuregis en furioza hasto kiel frenezulo renversante seĝojn, tablojn tiel, ke la porcelanaĵo, la vitraj ujoj frakasiĝis. Tute timigita la Scuderi kriis: „Pro ĉiuj sanktuloj, kio okazas al tiu homo!“ Sed la markizino, en aparte gaja humoro, kiu superis ŝian aliokaze tute fremdan petolemon, eksplodis per laŭta ridego kaj diris: „Jen ni rimarkas, fraŭlino, ke majstro René estas senmorte enamiĝinta al Vi kaj komencas laŭ ĝusta kutimo kaj pruvita konduto de vera galanteco ataki Vian koron per riĉaj donacoj.“ La Maintenon daŭrigis tiun ŝercadon donante al la Scuderi la admonon, ke ŝi ne estu tro kruela kontraŭ la malespera amanto, kaj tiu, cedante al sia denaska humoro, estis raptita de la fluo de mil gajigaj kapricoj. Ŝi diris, ĉar la aferoj nun estas tiaj, ke ŝi, finfine venkita, ne povos eviti prezenti al la mondo la ekzemplon de sepdektrijara oraĵistfianĉino de malriproĉa nobeleco. La Maintenon proponis plekti la fianĉinkronon kaj instrui ŝin pri la devoj de bona edzino, pri kiuj ja tiom eta knabina mondrigardulino ne povas havi multan scion.

Kiam nun la Scuderi ekstaris por foriri de la markizino, ŝi iĝis malgraŭ ĉiu ridanta ŝerco denove tre serioza, kiam la kesteto denove venis en ŝian manon. Ŝi diris: „Tamen, dam´ markizino, mi neniam uzos ĉi tiun ornamaĵon. Ĝi estis antaŭe, kiel ajn tio okazis, en la manoj de tiuj infernaj uloj, kiuj kun la impertinenteco de la diablo, ja eble eĉ en ties malbenita alianco rabas kaj murdas. Mi hororas antaŭ la sango, kiu ŝajne gluiĝas al tiu briletanta juvelaro. Kaj nun – mi devas konfesi tion – la konduto de Cardillac mem havas por mi ion timigan kaj makabran. Mi ne povas defendi min kontraŭ la obskura supozo, ke malantaŭ ĉioĉi kaŝiĝas ia horora, timiga mistero; kaj kiam mi metas la tutan aferon kun ĉiu kondiĉo sufiĉe klare antaŭ miajn okulojn, mi tamen ne povas eĉ nur supozi, en kio konsistus la mistero kaj entute, kiel la honesta, brava majstro René, la modelo de bona, pia civitano, povus havi iun rilaton al ia malbono, abomeninda. Sed tio estas certa, ke mi neniam arogos surmeti la ornamaĵon.

La markizino diris, tio signifus troigi la skrupulojn; sed kiam nun la Scuderi demandis ŝin pro ŝia konscienco, kion ŝi en sia, de la Scuderi, situacio farus, ŝi respondis serioze kaj forte: „Multe pli volonte ĵeti la ornamaĵon en la Sejnon ol porti ĝin iam ajn.“

Pri la sceno kun la majstro Cardillac la Scuderi verkis tre graciajn versojn, kiujn ŝi la sekvan vesperon recitis en la salonoj de la Maintenon antaŭ la reĝo. Eble estis, ke ŝi je la kostoj de majstro Cardillac, venkante ĉiujn hororojn de sinistra antaŭsento, scipovis priscribi en viglaj koloroj la gajigan imagon de sepdektrijara oraĵistfianĉino de praaĝa nobelaro. Sufiĉe, la reĝo ridegis kaj ĵuris, ke Boileau Despréaux<sup>26</sup> trovis sian majstron, pro kio la poemo de la Scuderi estis juĝata la plej sprita, kiu iam estis verkita.

Pluraj monatoj estis preterpasintaj, kiam hazarde okazis, ke la Scuderi veturis en la vitra droŝko de la dukino de Montansier<sup>27</sup> trans la *Pontneuf*<sup>28</sup>. La invento de la gracilaj vitrodroŝkoj estis ankoraŭ

<sup>26</sup> Nicolas Boileau-Despréaux (1636-1711) estis la gvida poeto de la franca racionalismo, aŭtoro de la „Art Poétique“ (1674) kaj amiko de la aŭtoroj Corneille, Molière, Racine kaj La Fontaine.

<sup>27</sup> Julie-Lucine d'Angennes (1607-1690), edzino de la duko de Montausier, estis la edukistino de la reĝaj infanoj.

tiel nova, ke la scivolema popolo amasiĝis, kiam tiaspeca veturilo aperis sur la stratoj. Tiel ankaŭ okazis, ke la gapanta plebo sur la Pontneuf ĉirkaŭis la droŝkon de la Montansier preskaŭ haltigante la paŝadon de la ĉevaloj. En tiu momento la Scuderi subite ekaŭdis skoldadon kaj sakradon kaj rimarkis, kiel iu homo per pugnobatoj kaj ripopuŝoj faris al si spacon tra la plej densa homamaso. Kaj kiam li venis pli proksimen, trafis ŝin la traboraj rigardoj de morte pala, aflikte konfuzita vizaĝo de junulo. Fikse rigadis ŝin la junulo, dum li per kubutoj kaj pugnoj ŝovis sin bruske antaŭen, ĝis li venis al la ĉaropordeto, kiun li kun hasta impeto malfermis, ĵetis al la Scuderi slipon en la sinon kaj disdonante kaj ricevante puŝojn, pugnobatojn malaperis kiel veninte. Kiam la homo atingis la droŝkan pordeton, la Martinière, kiu troviĝis apud la Scuderi, estis kun krio de terurego svene resinkinta en la ĉarkusenojn. Vane tiregis la Scuderi la ŝnuron, alvokis la koĉeron; tiu, kiel pelata de malbona fantomo, ekvipis la ĉevalojn, kiuj ŝprucante ŝaŭmon for de la buŝoj, kalcitris ĉirkaŭ si, baŭmis, fine en rapida galopo forpumpumis trans la ponton. La Scuderi verŝis sian parfumflakonon sur la svenintan sinjorinon, kiu fine malfermis la okulojn kaj tremante kaj vibrante firmtenis sin kramfe ĉe la mastrino, timon kaj hororon en la pala vizaĝo, penige ĝemis: „Pro la sankta virgulino! Kion volis la terura homo? – Aĥ, li estis ja, li estis, la sama, kiu en tiu horora nokto portis al Vi la kesteton!“ – La Scuderi trankviligis la bedaŭrindan inon, imagigante al ŝi, ke ja tute ne okazis io malbona kaj ke nur gravas ekscii, kion la slipo enhavas. Ŝi malfaldis la folieton kaj trovis la vortojn: „Mava fatalo, kiun Vi kapablis preventi, puŝas min en la abismon! – Mi petegas Vin kiel filo la patrinon, kiun li ne povas lasi, kun la plej plena ardo de infana amo, ke Vi resendu la kolĉenon kaj la braceletojn, kiujn Vi ricevis per mi, sub iu ajn preteksto – por plibonigi, ŝanĝigi ion ajn – al la majstro Cardillac. Via savo, Via vivo dependas de tio. Se Vi ne faros tion ĝis postmorgaŭ, tiam mi penetros en Vian loĝejon kaj murdos min antaŭ Viaj okuloj.“

„Nun estas certe“, diris la Scuderi, kiam ŝi estis leginta tion, „ke tiu mistera homo, se li vere apartenas al la bando de la damnitaj ŝtelistoj kaj murdistoj, tamen ne havas malbonan intencon kontraŭ mi. Se li en tiu nokto estus sukcesinta paroli kun mi, kiu scias, kia stranga okazaĵo, kia enigma rilato inter la aferoj estus klariĝinta al mi; nun mi vane serĉas eĉ la plej etan supozon en mia animo. Sed la afero nun estu kia ajn, mi faros tion, kio estas ordonita al mi per tiuĉi folio, ankaŭ se tio okazus nur por liberigi min de la fatala ornamaĵo, kiu ŝajnas al mi esti infera talismano de la Malbonulo. Certe Cardillac, fidela al sia malnova kutimo, ne dezirus elmanigi ĝin tiel facile.“

Jam la sekvan tagon la Scuderi planis iri kun la ornamaĵo al la oraĵisto. Sed estis kvazaŭ ĉiuj estetikuloj de Parizo estus interkonsentitaj, ke ili ĵus je ĉitiumateno superŝutu la fraŭlinon kun versoj, dramoj, anekdotoj. Apenau Chapelle<sup>29</sup> estis voĉleginta la scenon de iu sia tragedio kaj ruze asertinta, ke li nun pensas certe venki eĉ Racine, kiam ĉilasta mem eniris kaj nokaŭtis lin per patosa parolado de iu ajn reĝo, ĝis Boileau sendis siajn fajrokuglojn en la nigran tragikan ĉielon, por ke li ne devu eterne aŭdi la parolaĉon pri la kolonado de la Louvre, al kiu la arkitekta doktoro Perrault<sup>30</sup> estis limiginta lin.

Estiĝintis alta tagmezo, la Scuderi devis iri al la dukino Montansier, kaj sekve la vizito ĉe majstro Cardillac restis prokrastota ĝis la sekvonta mateno. – La Scuderi sentis sin torturata de iu eksterordinara maltrankvilo. Daŭre la junulo staris antaŭ ŝiaj okuloj, kaj el ŝia plej profunda interno volis formiĝi malhela engramo, kvazaŭ ŝi jam estis vidinta ĉitiumvizaĝon, ĉitium trajtojn. Timigaj songoj ĝenis la plej subtilan dormeton; ŝajnis al ŝi, ke ŝi facilanime, eĉ puninde neglektis kapti helpeme la manon, kiun la mizerulo, dronanta en la abismon, etendis supren al ŝi, eĉ kvazaŭ estus estinta ŝia devo deturni iun pereigan okazaĵon, iun fatalan krimon. – Tuj kiam estiĝis frua mateno, ŝi vestigis sin kaj veturis provizita per la ornamaĵkesteto direkte al la oraĵisto.

<sup>28</sup> *Spite al la franca nomo por la „Nova Ponto“ unu el la plej malnovaj pontoj de Parizo.*

<sup>29</sup> *Jean de la Chapelle (1655-1723) estis aŭtoro de diversaj tiatempe sukcesplenaj tragedioj.*

<sup>30</sup> *Claude Perrault (1613-1688): kuracisto kaj arkitekto; projektis i.a. la fasadon de la Louvre. (Ne intermiksi lin kun lia frato Charles, kiu gajnis senmortan famon per siaj fabeloj!)*

Al la strato Nicaise, tien, kie loĝis Cardillac, svarmis la popolamaso, kolektiĝis antaŭ la dompordo, kriis, bruis, furiozis, intencis ŝturme eniri, pene detenata de la Maréchaussée, kiu ĉirkaŭis la domon. En la sovaĝa, konfuza bruego kriis koleraj voĉoj : „Disŝiru, dispistu la malbenitan murdiston!“ – Fine Degrais aperas kun multnombra taĉmento, tiu igas transirejon en la plej densan homamason. La dompordo vehemente malfermiĝas, homo ŝarĝita per ĉenoj, estas kondukata eksteren kaj fortirata sub hororaj sakraĵoj de la furioza plebo. En la momento, kiam la Scuderi, kvazaŭ ne havante animon pro hororo kaj terura supozo, rimarkas tion, ŝrika lamento penetras en ŝiajn orelojn. „Antaŭen! – pli antaŭen!“ ŝi kriis tute ekster si al la koĉero, kiu per lerte rapida turno dispelas la densan amason kaj haltas proksime al dompordo de Cardillac. Jen la Scuderi vidas Desgraison kaj ĉe ties piedoj junulinon, bela kiel la tago, kun malplektitaj haroj, duone malvestita, sovaĝa timo, senkonsola malespero en la vizaĝo; tiu ĉirkaŭtenas kun siaj brakoj liajn genuojn kaj vokas kun la sono de terurega, akra mortangoro: „Li ja estas senkulpa! – li estas senkulpa!“ Vanaj estas la penoj de Degrais, vanaj tiuj de ties homoj, por forŝiri ŝin, starigi ŝin sur la teron. Fine kruda fortulo kaptas la mizerulinon per plumpaj pugnoj, tiregas ŝin for de Degrais, stumblas, perdas la junulinon, kiu vehemente falegas malsupren de la ŝtonaj ŝtupoj kaj restas mallaŭte, morte kuŝanta sur la strato. Pli longe la Scuderi ne povas reteni sin. „En la nomo de Kristo, kio okazis, kia evento ekzistas ĉitie?“ ŝi vokas, malfermas rapide la pordon, eliras. – Respektplene la popolo cedas antaŭ la dignoplena damo, kiu, kiam ŝi vidas, kiel kelkaj kompataj virinoj estas levintaj la junulinon, sidigintaj sur la ŝtupojn, frotas al ŝi la frunton kun parfumita akvo, alproksimiĝas al Desgrais kaj ripetas emfaze la demandon.“ – „Okazis io ŝokiga“, diras Degrais, „René Cardillac hodiaŭ matene estas trovita murdita per stiletpiko. Lia metiasistanto Oliviero Brusson<sup>31</sup> estas la murdisto. Ĝus li estas forkondukita en la malliberejon.“ – „Kaj la knabino?“ vokas la Scuderi, – „estas“, interrompas ŝin Degrais, „estas Madelon, la filino de Cardillac. La malbenita homo estis ŝia amanto. Nun ŝi larmas kaj ploras kaj krias seninterrompe, ke Olivier estas senkulpa, tute senkulpa. Eble ŝi scias pri la malbonfaro kaj mi devas transportigi ankaŭ ŝin al *Conciergerie*<sup>32</sup>.“

Degrais ĵetis, kiam li diris tion, perfideman, malice ĝojan rigardon al la junulino, per kio la Scuderi timtremis. Ĝus la knabino apenaŭ komencis spiri, ne kapabla je iu sono, je iu movo, ŝi kuŝis kun fermitaj okuloj, kaj oni ne sciis, kion fari, ĉu porti ŝin en la domon aŭ ankoraŭ pli longe helpi ŝin ĝis la vekigo. Profunde emociita, larmoj en la okuloj, la Scuderi la senpekan anĝelon, ŝi sentis hororon pri Degrais kaj ties kumpanoj. Jen oni aŭskultis de sur la stuparo obtuzan pumpumon; oni alportis la kadavron de Cardillac. Rapide decidiĝinta la Scuderi vokis laŭte: „Mi prenos la knabinon kun mi, Vi, Degrais, bonvolu zorgi pri la alio!“ Obtuzo murmurado de aprobo disvastiĝis inter la popolo. La virinoj levis la junulinon alten, ĉiuj altrudiĝis, cent manoj penis helpi ilin, kaj kvazaŭ ŝvebe en la aeroj la knabino estis portata en la kaleŝon, dum benadoj aŭdeblis de ĉies lipoj por la digna damo, kiu estis forŝirinta la senkulpulinon de la sangeca tribunalo.

La klopodoj de Séron<sup>33</sup>, la plej famkonata kuracisto en Parizo, fine sukcesis revivigi Madelon'on, kiu dum horoj estis kuŝanta en rigida senkonscienco. La Scuderi kompletigis, kion la kuracisto estis komencinta, farante lumi kelkan milde esperigan radion en la animo de la knabino, ĝis forta fluo de larmoj, kiu torentis el ties okuloj, liberigis ŝin. Dum nur de tempo al tempo la superforto de plej traboranta aflikto sufokis la vortojn per profunda singulto, ŝi kapablis rakonti, kiel ĉio estis okazinta.

Je la noktomezo ŝi estis vekigita per mallaŭta batado al la ĉambropordo kaj aŭdis la voĉon de Oliviero, kiu petegis ŝin, tujege ekstari, ĉar la patro estas mortonta. Terurigita ŝi eksaltis kaj malfermis la pordon. Oliviero, pala kaj deformita, gutadanta pro ŝvito, iris, la lumon en la mano, kun ŝanceliĝantaj paŝoj al la metiejo, ŝi sekvis lin. Tie kuŝis la patro kun fiksrigardantaj okuloj

<sup>31</sup> *De Hoffmann arbitre inventita nomo.*

<sup>32</sup> *La Conciergerie estis jam ek de la mezepoko la esplorarestejo.*

<sup>33</sup> *Propra kuracisto de la ministro Louvois.*

stertoranta en agonio. Lamentante ŝi ĵetis sin sur lin kaj rimarkis nur nun lian sangoplenan ĉemizon. Oliviero kviete fortiris ŝin kaj poste penis lavi per kuraciga balzamo vundon en la maldekstra brusto de la patro kaj pansu ĝin. Intertempe estis reveninta la konscienco de la patro, li finis stertori kaj alrigardis animplene ŝin kaj tiam Olivieron, kaptis ŝian manon, metis ĝin en la manon de Oliviero kaj vehemente premis ambaŭ. Ambaŭ, Oliviero kaj ŝi, sinkis apud la kuŝejo de la patro sur la genuojn, tiu, kun akra sono, rektigis sin alten, sed tuj resinkis kaj mortis kun profunda suspiro. Nun ili ambaŭ laŭte lamentis kaj vekriis. Oliviero rakontis, kiel en sia ĉeesto la majstro estas mordita dum prizorgo, kiun li laŭ ties ordono devis entrepreni kun li en la nokto, kaj kiel li kun plej granda penado portis hejmen la pezan viron, kiun li ne opiniis vundita je morto. Kiam la mateno estis aperinta, la najbaroj, kiuj en la nokto estis rimarkintaj la pumpumadon, la laŭtan ploradon kaj lamentadon, suprenvenis kaj trovis ilin ankoraŭ tute senkonsole genuantaj apud la kadavro de la patro. Tiam ekestis bruoj, la Maréchaussée enpenetris kaj Oliviero estis fortirata kiel murdisto de sia majstro en la malliberejon.

Madelon nun aldonis plej emociigan priskribon de la virto, la pieco, la fideleco de sia amata Oliviero. Kiel li lian majstron, kvazaŭ kiel sian propran patron estis teninta en alta honoro, kiel tiu estis plenmezure reciprokinta lian amon kaj malgraŭ ties malriĉeco elektis lin bofilo, ĉar ties lerteco estis egala al lia fideleco, al la nobla koro. Ĉion tian Madelon rakontis el la plej interna koro kaj finis dirante, ke, se Oliviero puŝintus en ŝia ĉeesto la stileton en la bruston de ŝia patro, ŝi estus kredinta tion plie trompaĵon de la satano ol ke ŝi kredus, ke Oliviero estus kapabla je tia tremiga, terurega krimo.

La Scuderi, plej profunde emociigita per la neeldirebla aflikto de Madelon kaj inkлина, prijuĝi la mizeran Olivieron senkulpa, kolektis informojn kaj trovis ĉion ĝusta, kion Madelon estis rakontinta pri la endoma rilato de la majstro kun lia asistanto. La kunloĝantoj en la domo, la najbaroj laŭdis unuvoĉe la Olivieron kiel prototipon de bonmora, pia, fidela, diligenta konduto; neniu sciis ian malbonon pri li, kaj tamen, se oni parolis pri la terura faraĵo, ĉiu levis la ŝultrojn kaj diris, ke io neklarigebla ĉeestas.

Oliviero, starigita antaŭ la Chambre ardente, kontestis, kiel la Scuderi eksciis, kun plej granda persisto, kun la plej granda libereco la akuzitan faron kaj asertis, ke lia majstro en lia ĉeesto estis atakita kaj teren sternita sur la strato, sed ke li lin ankoraŭ vivantan trenis hejmen, kie li tre baldaŭ mortis. Do ankaŭ tio harmoniis kun la rakonto de Madelon.

Ĉiam kaj ĉiam denove la Scuderi ripetigis al si la plej etajn cirkonstancojn de la horora evento. Ŝi esploris akurate, ĉu iam ajn iu kverelo okazis inter majstro kaj asistanto, ĉu Oliviero eble ne estus tute libera de tiu ekkoleremo, kiu kiel blinda frenezo surprize atakas la plej bonkorajn homojn kaj instigas ilin al faraĉaĵoj, kiuj ŝajnas ekskludi ĉiun arbitrecon de la agado. Sed ju pli entuziasme Madelon parolis pri la hejma feliĉo, en kiu la tri homoj estis interligitaj per plej intima amo, des pli malaperis ĉiu ombro de suspekto kontraŭ la je morto akuzata Oliviero. Ĉion detale ekzamenante, elirante de la ebleco, ke Oliviero malgraŭ tio, kio klare atestis lian malkulpecon, povus tamen esti la murdisto de Cardillac, la Scuderi inter la multaj eblecoj ne trovis iun motivon por la hororiga faro, kiu ĉiukaze devis neniigi la feliĉon de Oliviero. – Li estas malriĉa, sed lerta. Li sukcesas gajni la simpation de la plej famkonata majstro; li amas ties filinon, la majstro favoras lian amon; feliĉo, prospero por lia tuta vivo estas ofertataj al li! – Sed la afero estu nun kiel ajn, ke Oliviero – dio sciuj – iamaniere lacesita de kolero, murdeme atakis sian bonfaranton, sian patron, kia diableca hipokriteco provokas konduton post la farado tute alian ol okazis vere! – Kun la firma konvinko pri la senkulpeco de Oliviero la Scuderi decidis savi je ĉiuj kostoj la senkulpan junulon.

Ŝajnis al ŝi plej konsilinde, antaŭ ol ŝi eble alvokus la gracon de la reĝo mem, turni sin al la prezidento La Regnie, atentigi lin pri ĉiuj cirkonstancoj, kiuj devis evidentigi la senkulpecon de Oliviero kaj tiamaniere eble vekigi en la animo de la prezidento internan, por la akuzato favoran

konvinkon, kiu trairu bonŝance al la juĝistoj.

La Regnie akceptis la Scuderi-n kun la alta estimo, kiun la respektinda, de la reĝo mem honorigata damo, povis ĝuste pretendi. Trankvile li aŭskultis ĉion, kion ŝi raportis pri la hororiga faraĵo, pri la rilatoj de Oliviero, pri ties karaktero. Sed fajna, preskaŭ sardona rideto estis ĉio, per kio li pruvis, ke la asertoj, la de oftaj larmoj akompanataj admonoj, ke la juĝisto ne rajtas esti la malamiko de la akuzato, sed devas atenti pri ĉio, kio favoras ties avantaĝon, ne tute preterpasis surdajn orelojn.

Kiam la fraŭlino, nun finfine tute elĉerpita, silentis forsekigante la larmojn el la okuloj, La Regnier ekparolis: „Dignigas tute Vian bonegan koron, mia fraŭlino, ke Vi, emociita per la larmoj de juna enamiĝinta knabino, kredas ĉion, kion ŝi diras, kaj ke Vi ne kapablas imagi la teruran faraĉaĵon; sed tute alie estas ĉe la juĝisto, kiu kutimas forŝiri la maskon de la impertinenta hipokriteco. Povas esti, ke ne estas mia devo detale klarigi al ĉiu, kiu demandas min, la iradon de kriminalproceso. Fraŭlino, mi faras mian oficon; malmulte mi atentis la prijuĝon de la mondo. La krimuloj timtremu antaŭ la Chambre ardente, kiu ne konas alian punon ol santon kaj fajron. Sed antaŭ Vi, estimata fraŭlino, mi ne volas esti kredata monstro de rigoreco kaj krudeleco; pro tio permesu al mi, ke mi per malmultaj vortoj klare priskribu al Vi la sangokulpon de la juna malbonulo, kiu – dank’ al la ĉielo – estas submetota al la venĝo. – Tiam Via sagaca spirito mem rifuzos la bonanimecon, kiu faras al Vi tiom da honoro, sed al mi tute ne decus. – Do! – Matene René Cardillac estas trovata murdita per stiletpiko. Neniu estas apud li ol lia asistanto Oliviero Brusson kaj la filino. En la ĉambro de Oliviero oni trovas inter alia la stileton makulitan de freŝa sango; ĝi konformas precize al la vundo. – ‘Cardillac, diras Oliviero, estas puŝita teren en ĉitiu nokto antaŭ miaj okuloj.’ – ‘Ĉu oni intencis prirabi lin?’ – ‘Tion mi ne scias!’ – ‘Vi akompanis lin, kaj ĉu ne estis eble al vi rebati la murdiston, firmteni lin, kii pri helpo?’ – ‘Dek kvin, eble dudek paŝojn antaŭ mi iris la majstro, mi sekvis lin.’ – ‘Pro kio en la tuta mondo tiom malproksime?’ – ‘La majstro volis tion.’ – ‘Kion cetere majstro Cardillac tiel malfrue devis fari sur la strato?’ – ‘Tion mi ne scias diri.’ – ‘Sed alitempe li ja neniam forlasis la domon post la naŭa horo vespere!’ – Tiam hezitas Oliviero, li estas konfuzita, li ĝemas, li verŝas larmojn, li ĵuras ĉe ĉio, kio estas sankta, ke Cardillac vere en tiu nokto eliris el la domo kaj renkontis sian morton. Sed nun aŭskultu atente, fraŭlino:

Pruvite estas ĝis la absoluta certeco, ke Cardillac en tiu nokto ne forlasis la domon, sekve la aserto de Oliviero, ke li eliris kun li, estas impertinenta mensogo. La dompordo estas ekipita per forta seruro, kiu dum la malŝlosado kaj la fermado kaŭzas aĉe penetrigan sonon, kaj poste la pordoklapoj moviĝas naŭze knarante kaj kriĉante en la hingoj tiel, kiel faritaj provoj certigis, ke la bruego resonas eĉ en la plej supra etaĝo de la domo. Sed loĝas ja sur la plej malsupra etaĝo, sekve proksime al la dompordo, la olda majstro Claude Patru kun sia dommastrina helpantino, persono de preskaŭ okdek jaroj, sed ankoraŭ vigla kaj agema. Tiuj ambaŭ aŭskultis, kiel Cardillac laŭ sia kutima faro je tiu vespero precize je la naŭa malsuprenvenis la ŝtuparon, ŝlosfermis kaj rigligis la pordon sub granda bruo, poste reiris supren, legis laŭtvoĉe la kompletorion kaj tiam, kiel oni povis depreni de la klakfermo de la pordo, iris en sian dormoĉambron. Majstro Claude suferas je sendormeco, kiel kutime ja okazas al maljunuloj. Ankaŭ dum tiu nokto li ne kapablis fermi la okulojn. Pro tio la dommastrina helpantino – estis eble la naŭa kaj duona horo – ekbruligis lumilon en la kuirejo, kien ŝi irante tra la koridoro estis veninta kaj sidiĝis ĉetable apud la majstro Claude kun malnova kroniko, en kiu ŝi legis, dum la oldulo, meditante pri siaj pensoj, jen eksidis en la apogseĝon, jen denove ekstaris kaj, por atingi lacecon kaj dormemon, paŝis mallaŭte kaj lante en la ĉambro tien kaj reen. Ĉio restis silente kaj trankvile ĝis post la mezonokto. Tiam ŝi aŭdis super si fortajn paŝojn, akran pumadon kvazaŭ peza ŝarĝaĵo falegus planken, kaj tuj poste kvazaŭ sufokitan ĝemadon. Ilin ambaŭ invadis stranga angoro kaj korpremo. La hororoj antaŭ ia ĵus okazinta ege terura agado preterpasis ilin. – Kun la hela mateno tiam klariĝis, kio estis komenciĝinta dum la mallumo.“ – „Sed“, objetis la Scuderi, „sed pro ĉiuj sanktuloj, ĉu Vi povas vidalvide de ĉiuj cirkonstancoj, kiujn mi detale rakontis al Vi, imagi iun ajn motivon por tiuĉi fifaro de la inferno?“ – „Hm“, respondis La Regnie, „Cardillac ne estis malriĉa – li posedis valoregajn gemojn.“ – „Ĉu ne



ĉion estus ricevinta la filino? Vi forgesas, ke Oliviero estis la estonta bofilo de Cardillac.“ – „Eble li devis dividi aŭ eĉ nur murdi antstataŭ aliaj“, diris Regnie. – „Dividi, murdi anstataŭ aliaj?“ demandis la Scuderi ekmieregante. – „Sciu“, daŭrigis la prezidento, „sciu, fraŭlino, ke Oliviero jam delonge estus verŝinta sian sangon sur la Grèveplaco, se lia faritaĵo ne havus konekson al la dense vualita sekreto, kiu ŝvebis super la tuta Parizo. Ŝajnas, ke Oliviero apartenas al tiu abomeninda bando, kiu, primokante ĉiun atentemon, ĉiun penadon, ĉiun ekzamenadon far la kortumoj, sciis sendanĝere kaj senpune efektiviĝi siajn kanajlaĵojn. Pere de li ĉio klariĝos – devas klariĝi. La vundo de Cardillac similas tute al tiuj, kiujn montris ĉe si ĉiuj sur la strato, en la domoj murditaj kaj prirabitoj. Sed nun, kio estas la plej decidiga: Ek de la tempo, de kiam Oliviero Brusson estas arestita, ĉesis ĉiuj murdoj, ĉiuj raboj. Same sekuraj estas la stratoj dum la nokto kiel dum la tago: Sufiĉe da pruvo, ke Oliviero verŝajne staris ĉekape de tiu bando de murdistoj. Ĝis nun li ne pretas konfesi, sed ekzistas rimedoj por paroligi lin kontraŭ lia volo.“ – „Kaj Madelon“, vokis la Scuderi, „kaj Madelon, la fidela, senkulpa kolombino?“ – „Ej“, diris La Regnie kun malica rideto, „ej, kiu garantias al mi, ke ŝi ne partoprenas la komploton? Kian intereson ŝi havas koncerne la patron? Nur favore al la murdbubo fluas ŝiaj larmoj.“ – „Kion Vi diras“, kriis la Scuderi, „ne eblas; la patron! tiu knabino!“ – „O!“ daŭrigis La Regnie, „o! pensu nur pri la Brinvillier! Bonvolu pardoni al mi, se mi eble baldaŭ sentas min devigata forŝiri de Vi ŝin, kiun Vi protektas, kaj enkarcerigi en la Conciergerie.“ – Tra la Scuderi fluis hororo ĉe tiu ekstremiga supozo. Estis al ŝi kvazaŭ nenia fideleco, nenia virto povus ekzisti antaŭ tiu timenda viro, kvazaŭ li vidus en la plej profundaj, plej intimaj pensoj murdon kaj sangopunon.

Ŝi leviĝis. „Estu humana“, tio estis ĉio, kion ŝi angorplene, preskaŭ sen spiro kapablis eligi. Jam descendonte la ŝtupapron, al kiu la prezidento estis akompaninta ŝin kun ceremonia afableco, venis al ŝi – ŝi mem ne sciis, kiamaniere – stranga ideo. „Ĉu estus eble al mi permesate, ke mi vidu la malfeliĉan Olivieron Brusson?“ Tiel ŝi rapide turniĝante demandis la prezidenton. Tiu alrigardis ŝin kun hezitema mieno, tiam li grimacis kun la hida rideto, kiu estis karakteriza trajto de li. „Certe“, li diris, „certe, mia kara fraŭlino, se Vi nun, pli fidante al Via sentimento, al la interna voĉo ol al tio, kio okazis antaŭ niaj okuloj, deziras mem pruvi la kulpon aŭ senkulpecon de Oliviero. Se Vi ne timas la malluman restadejon de la krimo, se Vi ne abomenas vidi la imagojn de la fienco en ĉiuj nuancoj, tiam la pordegoj de la Conciergerie estu por Vi dum du horoj malfermitaj. Oni prezentos al Vi tiun Olivieron, kies sorto elvokas Vian emocion.“

Fakte la Scuderi ne sukcesis konvinki sin pri la kulpo de la junulo. Ĉio atestis kontraŭ li, neniu juĝisto sur la mondo vidalvide de tiel decidaj faktoj ja estus aginta alimaniere ol La Regnie. Sed la bildo de hejma feliĉo, kiam Madelon estis prezentinta al la okuloj de la Scuderi en plej viglaj trajtoj, superbrilis ĉiun malbonan suspekton, kaj sekve ŝi preferis konjekti iun neklariĝeblan misteron ol kredi al tio, kontraŭ kio ribelis ŝia tuta interno. Ŝi intencis igi Olivieron rakonti al ŝi ĉion denove, kiel ĝi estis okazinta dum tiu fatala nokto, kaj penetri laŭeble plej profunde en misteron, kiu eble estis restinta fermata por la juĝistoj, ĉar ĝi ŝajnis tro senvalora por pliatenti ĝin.

Kiam la Scuderi estis alveninta en la Conciergerie oni kondukis ŝin en grandan, helan salonon. Post nelonga tempo ŝi aŭdis tintadon de ĉenoj. Oliviero Brusson estis alportata. Sed kiam li trairis la pordon, la Scuderi sinkis svenante teren. Kiam ŝi estis kolektinta novajn fortojn, Oliviero estis malaperinta. Ŝi postulis vehemente, ke oni portu ŝin al la ĉaro; for, senprokraste for ŝi volis el la ejoj de la krima malbenindaĵo. Ah! – je la unua ekrigardo ŝi estis ekkoninta en Oliviero Brusson la junan homon, kiu sur la Pontneuf metis al ŝi en la ĉaron tiun folion, kiu estis portinta al ŝi la kesteton kun la juveloj. – Nun ĉiu dubo estis eliminata, la terura supozo de La Regnie certigita. Oliviero Brusson apartenas al la monstra bando de murdistoj; certe li murdis ankaŭ la majstron. – Kaj Madelon? – Tiom dolorige ankoraŭ neniam trompita de la interna sentimento, ĝismorte kaptita de la inferna surtera potenco, je kies ekzisto ŝi ne estis kredinta, la Scuderi malesperis pri ĉiu veraĵo. Ŝi cedis al la teruriga suspekto, ke Madelon estas konspiranta kaj eble partoprenas en la abomena sangodelikto. Kiel okazas, ke la homa animo, kiam aperas antaŭ ĝi ia imago, diligente serĉas kaj

trovas kolorojn, por pentri ĝin pli akra kaj pli intensa, tiel ankaŭ la Scuderi, pripensante ĉiun cirkonstancon de la faritaĵo, konsiderante la konduton de Madelon en la plej etaj trajtoj, trovis eĉ multon nutrantan tiun suspekton. Tiamaniere kelkspeca afero, kiu ĝis nun estis rigardata pruvo de senkulpeco kaj senmakuleco, iĝis firma rekonilo de krima malico, de ekzercita hipokritaĵo. Tiu korŝira lamento, la sangecaj larmoj povis eventuale esti elpremitaj per la mortangoro, ke ŝi vidis la amanton verŝi la sangon, eĉ – eble mem perdi la kapon per la mano de la gilotinisto.

Tuj forigi de si la serpenton, kiun si nutris ĉe sia brusto, kun tiu decido la Scuderi eliris el la veturilo. Kiam ŝi estis irinta en sian ĉambron, Madelon ĵetis sin antaŭ ŝiajn piedojn. Kun ĉielaj okuloj – anĝelo de dio ne havas pli fidelajn – al ŝi levitaj, kun manoj antaŭ la tremanta brusto kunfalditaj ŝi lamentis kaj petegis helpon kaj konsolon. La Scuderi, pene regante sin, diris, dum ŝi provis doni al la sono de sia voĉo laŭeble plej multon da seriozeco kaj trankvilo: „Ek, foriru! Konsolu vin kun la murdisto, kiun atendas la justa puno por liaj fifaraĵoj. La sankta Virgulino preventu, por ke sur vi mem ne pezegu sangokulpo!“ – „Ho ve! Nun ĉio estas perdita!“ – Kun ĉitiu akresona elkrio Madelon falegis senkonscie teren. La Scuderi transdonis la zorgon pri la junulino al la Martinière kaj malaperis en alian ĉambron.

Tute disŝirita en sia interno, disigita de ĉio surtera, la Scuderi deziris ne plu vivi en mondo plena de infera trompo. Ŝi akuzis la destinon, kiu estis donacinta al ŝi kun amara moko la firmiĝon de ŝia konfido al virto kaj fideleco kaj nun en ŝia maljuna aĝo detruas la belan bildon, kiu lumigis al ŝi la vivon.

Ŝi aŭdis, kiel la Martinière fortiris Madelonon, kiu mallaŭte ĝemis kaj lamentis: „Ho ve! – Ankaŭ ŝin la krueluloj persvadis. – Mi povra – vi kompatinda, malfeliĉa Oliviero!“ – Tiujĉi sonoj penetris la koron de la Scuderi, kaj denove ele el la plej profunda interno ekmoviĝis la supozo pri mistero, la kredo al la senkulpeco de Oliviero. Turmentita per plej diferencaj sentoj, tute ekster si mem la Scuderi vokis: „Kia fantomo de la infero implikis min en la hororigan aferon, kiu kostos min la vivon!“ – En ĉitiu momento eniris Baptisto, pala kaj terurigita, kun la informo, ke Desgrais estas ekstere. Ek de la abomeninda procezo kontraŭ la Voisin la apero de Desgrais en iu domo estis la certa antaŭsigno de iu torturcela akuzo; el tio estiĝis la ektimo de Baptisto, pro tio demandis lin la fraŭlino kun milda rideto: „Kio okazas al vi, Baptisto? – Ĉu ne vere, la nomo ‘Scuderi’ troviĝis sur la listo de la Voisin?“ – „Ah, pro Kristo“, respondis Baptisto tremante kun la tuta korpo, „kial Vi povas ion tian eldiri; sed Degrais – la terura Degrais kondukas tiel mistere, tiel urge; ŝajnas, ke li ne povas atendi, ĝis li vidas Vin!“ – „Nu“, diris la Scuderi, „nu, Baptisto, tiam enkonduku tuj la homon, kiu estas al vi tiom timiga kaj kiu minimume ĉe mi ne povas eksciti iun zorgon.“ –

„La prezidento“, diris Desgrais, kiam li estis enirinta la ĉambron, „la prezidento La Regnie sendas min al Vi, mia fraŭlino, kun peto, kies plenumon mi ne kuraĝus esperi, se mi ne konus Vian virton, Vian kuraĝon, se ne en Viaj manoj estus la lasta rimedo por la prillumado de mava sangokulpo, se Vi mem ne estus partopreninta en la malbona procezo, kiu nek al la *Chambre ardente*, nek al ni ĉiuj permesis ripozon. Oliviero Brusson, ekde kiam li vidis Vin, estas duone fuioza. Kiel volonte li jam ŝajnis inklini al la konfeso, tiel li nun tamen ĵuras denove pro Kristo kaj ĉiuj sanktuloj, ke li estas tute senkulpa pri la murdo de Cardillac, kvankam li volonte estus preta suferi la morton, kiun li meritas. Atentu, mia fraŭlino, ke la lasta aldiraĵo ŝajne indikas aliajn krimfaraĵojn, kiuj ŝarĝas lin. Sed vanas ĉiu peno, eligi el li nur unu plian vorton, eĉ la minaco per la torturo ne efikis. Li petegas, li priĵuras nin, nur al Vi, al Vi sole li pretas konfesi ĉion. Degnu, mia fraŭlino, aŭskulti la konfeson de Brusson!“ – „Ĉu?“ – vokis la Scuderi ege indignita, „ĉu mi servu kiel perilo por la sangotribunalo, ĉu mi fiuzu la konfidon de la mizera homo, por porti lin al la ekzekutilo? – Ne, Degrais, ankaŭ se Brusson estas abomeninda murdisto, tamen al mi neniam estus eble trompi lin tiel fripone. Nenion mi deziras ekscii de liaj sekretoj, kiuj kiel sankta pekokonfeso restus fermitaj en mia brusto“. – „Eble“, objetis Desgrais kun ruza rideto, „eble, mia fraŭlino, Via pensmaniero ŝanĝiĝos, kiam Vi estos aŭdinta la Brussonon. Ĉu ne Vi mem petis la prezidenton, ke li estu humana?“

Li faras tion, cedante al la malstulta deziro de Brusson, kaj tiel provas la lastan rimedon, antaŭ ol li aljuĝos la torturon, kiun Brusson jam delonge meritas.“ – La Suderi senintence ekteruriĝis. – „Vidu“, daŭrigis Desgrais, „vidu, honorinda damo, oni neniel postulos de Vi ankoraŭfoje iri en tiujn nigrajn ejojn, kiuj plenigas Vin kun hororo kaj abomeno. En la kvieto de la nokto, sen ajna sensacio oni portos Olivieron Brussonon kvazaŭ kiel liberan homon al Vi en Vian domon. Eĉ ne kaŝe aŭskultata, sed bone gardata li tiam ĉion sendevige konfesu. Por ke Vi persone ne devas timi ion flanke de la malindulo, por tio mi garantias per mia vivo. Li parolas pri Vi kun arda honorigo. Li ĵuras, ke sole la sinistra fatalo, kiu malebligis al li vidi Vin pli frue, ĵetegis lin en la morton. Kaj tiam ja estas Via respondeco, de tio, kion Brusson malkaŝas al Vi, rakonti tiom, kiom plaĉas al Vi. Ĉu oni povas devigi Vin al io plia?“

La Scuderi rigardis cerbumante teren antaŭ si. Estis al ŝi, kvazaŭ ŝi devus obei al la supra potenco, kiu postulas de ŝi klarigon de ia hororiga mistero kvazaŭ ŝi ne povus retiri sin el la strangaj interplektiĝoj, en kiujn ŝi senvole estis veninta. Subite decida ŝi diris kun digneco: „Dio donos al mi paciencon kaj persistemon; konduku la Brussonon ĉitien, mi volas paroli kun li!“

Same kiel tiam, kiam Brusson alportis la kesteton, ĉirkaŭ meznokto estis batata al la dompordo de la Scuderi. Baptisto, informita pri la nokta vizito, malfermis. Glacie frida hororo superŝutis la Scuderin, kiam ŝi ekkonis laŭ la mallaŭtaj paŝoj, laŭ la obtuza murmurado, ke la gardistoj, kiuj estis alkondukintaj la Brussonon, disiĝis en la koridoroj de la domo.

Fine la ĉambropordo mallaŭte malfermiĝis. Desgrais envenis, malantaŭ li Oliviero Brusson, malkatenita, en deca vestaĵo. „Jen estas“ diris Desgrais kun respektplena riverenco, „jen, mia honorinda fraŭlino, estas Brusson!“ kaj forlasis la ĉambron. – Brusson sinkis teren sur ambaŭ genuojn antaŭ la Scuderi; petege li levis la falditajn manojn, dum multnombraj larmoj defluis el liaj okuloj. La Scuderi paliĝinta, senpova por paroli, malsupren rigardis al li. Eĉ malgraŭ la deformitaj, per akra doloro distorditaj trajtoj brilis la malfalsa esprimo de la plej fidela animo el la vizaĝo de la junulo. Ju pli longe la Scuderi lasis resti siajn okulojn sur la vizaĝo de Brusson, des pli vivoplene aperis la memoro pri iu amata persono, kiun ŝi nur ne sukcesis klare revoki en sian senson.

Ĉiuj hororoj cedis de ŝi, ŝi forgesis, ke la murdisto de Cardillac genuis antaŭ ŝi, ŝi parolis kun la ĉarma intonacio de trankviliga bonvolemo, kiu estis propra al ŝi: „Nu, Brusson, kion vi havas por diri al mi?“ Tiu, ankoraŭ plu genuante, ĝemis pro profunda, tutkora tristeco kaj diris tiam: „Oh, mia honorinda, altestimenda fraŭlino, ĉu ĉiu ŝpuro de memoro pri mi malaperis?“ – La Scuderi, ankoraŭ pli atente rigardanta lin, respondis, ke ŝi jes ja trovis en liaj trajtoj similecon kun iu de ŝi amita persono kaj ke nur tiu simileco estas la kaŭzo, ke ŝi superas la profundan abomenon antaŭ la murdisto kaj trankvile aŭskultas lin. Brusson, profunde ofendita per tiuj vortoj, leviĝis rapide kaj, la tristan rigardon direktanta teren, retiriĝis unu paŝon. Tiam li diris kun obtuza voĉo: „Ĉu Vi tute forgesis Anne Guiot? Ŝia filo Oliviero, la knabo, kiun Vi ofte lulis sur Viaj genuoj, estas tiu, kiu staras antaŭ Vi.“ – „Oh pro ĉiuj sanktuloj!“ vokis la Scuderi, dum ŝi, kovrante per ambaŭ manoj la vizaĝon, resinkis en la remburajon. La fraŭlino havis ja sufiĉan kialon por ekscitiĝi. Anne Guiot, la filino de malriĉiĝinta civitano, estis ek de la frua infanaĝo ĉe la Scuderi, kiu edukis ŝin kiel la patrino la karan infanon kun ĉiu fideleco kaj zorgemo. Post kiam ŝi estis plenkreskinta, venis bela honesta junulo, nomita Claude Brusson, kiu amindumis la knabinon. Ĉar li ja estis treege lerta horloĝisto, kiu certe povis abunde trovi sian panon en Parizo, ankaŭ Anne estis elkore ekaminta lin, la Scuderi ne hezitis konsenti pri la edziniĝo de sia adopta filino.

La junaj homoj aranĝis sin, vivadis en trankvila, feliĉa harmonio kaj, kio ankoraŭ plie firmigis la ligan inter la amantoj, tio estis la naskiĝo de mirige bela knabo, la ekzakta portreto de la ĉarma patrino. Idolon faris la Scuderi el la eta Oliviero, kiun ŝi dum longaj horoj, dum tutaj tagoj forprenis de la patrino por karesi, dorloti lin. Tiel okazis, ke la knabo tute kutimiĝis al ŝi kaj same volonte restadis ĉe ŝi kiel ĉe la patrino.

Tri jaroj estis preterpasintaj, kiam la profesia envio de la konkurantoj de Brusson efikigis, ke lia laboro ĉiun tagon pli kaj pli malkreskis tiel, ke li finfine preskaŭ ne povis vivteni sin. Aldoniĝis la sopiro al lia bela, hejmlanda Ĝenevo, kaj pro tio okazis, ke la malgranda familio tien translokiĝis, malgraŭ la rezistado de la Scuderi, kiu promesis ĉiujn eblajn subtenojn. Ankoraŭ kelkan fojon Anne skribis al sia kvazaŭpatrino, kiu estis prizorginta ŝin; poste ŝi silentis, kaj tiu devis kredi, ke la feliĉa vivo en la hejmlando de Brusson ne plu favorigis la rememoron pri la iame travivintaj tagoj. – Ĵus nun estis dudek tri jaroj, ek de kiam Brusson kun sia edzino kaj la infano estis forlasinta Parizon kaj translokiĝinta al Ĝenevo.

„Oh terure“, vokis la Scuderi, post kiam ŝi denove estis kolektinta siajn fortojn, „oh terure! – Oliviero, ĉu estas vi? – la filo de mia Anne! – Kai nun!“ – „Jes ja“, diris Oliviero trankvile kaj sinrege, „certe, mia honorinda fraŭlino, neniam Vi povintus supozi, ke la knabo, kiun Vi dorlotis kiel la plej tenera patrino, al kiu Vi, lulante lin sur Via sino, metis frandaĵon post frandaĵo en la buŝon, al kiu Vi donis la plej dolĉajn nomojn, iam ajn starus antaŭ Vi kiel maturiĝinta junulo akuzita je abomena sangokulpo! – Mi ne estas libera de riproĉoj, prave la *Chambre ardente* povas skoldi min pro krimo; sed samkiel mi esperas morti beate, ankaŭ se per la mano de la ekzekutisto, mi estas pura de ĉiu sangodelikto. Ne per mi, ne per mia kulpo mortis la mizera Cardillac.“ – Olivero dum tiuj vortoj ekstremis kaj ekŝanceliĝis. Silente montris la Scuderi al malgranda seĝo, kiu staris apud Oliviero. Li lante sidiĝis.

„Mi havis sufcie da tempo“, li komencis, „por prepari min por la interparolo kun Vi, kiun mi konsideras kiel la lastan gracon de la repacigita ĉielo, kaj por tiamaniere gajni tiom da kvieto kaj memregado, kiom necesas por rakonti al Vi la evoluon de mia terura, neaŭdita misfortuno. Koncedu al mi la kompaton, ke Vi pacience aŭskultu min, kiel ajn eble surprizos Vin, ja eĉ plenigos Vin per hororo la malkovro de mistero, kiun Vi certe ne estos supozinta. – Oh, ke mia patro neniam forlasintus Parizon! Laŭ la intenseco de mia memoro pri Ĝenevo mi retrovas min mem plorigitan, malsekigitan de la larmoj de miaj senkonsolaj gepatroj, de iliaj lamentoj, kiujn mi ne komprenis. Pli poste ekposedis min la klara konscio pri la treege premanta malriĉeco, la profunda mizero, en kiu vivis miaj gepatroj. Mia patro trovis sin trompita en ĉiuj siaj esperoj. Humiligita per profunda aflikto, sufokigita li mortis ĵus en la momento, kiam li estis sukcesinta dungigi min lernanto ĉe iu oraĵisto. Mia patrino parolis multon pri Vi, ŝi deziris plendi al Vi ĉion, sed tiam retenis ŝin la senkuraĝeco, kiu estiĝas per la mizero. Tio kaj ankaŭ la malĝusta honto, kiu ofte rodas ĉe la mortvundita animo, retenis ŝin de ŝia intenco. Kelkajn monatojn post la morto de mia patro sekvis lin mia patrino en la tombon.“ – „Povra Anne, povra Anne!“ vokis la Scuderi venkita de la doloro – „Dankon kaj laŭdon al la eterna potenco de la ĉielo, ke ŝi estas for kaj ne devas nun vidi, kiel falas la amata filo per la mano de la ekzekutisto, stigmatizita per hontego!“ Tiel Oliviero ekkriis laŭte ĵetante furiozan, teruran rigardon supren. Ekstere iĝis maltrankvile, oni paŝis tien kaj reen. „Ho, ho“, diris Oliviero kun amara rideto, „Degrais vekas siajn komplikojn, kvazaŭ mi povus forfuĝi de ĉitie. – Sed plue! – Mi estis traktata rigore de mia majstro, kvankam mi baldaŭ plej bone laboris, ja eĉ finfine multe superis la majstron.

Okazis, ke iam venis fremdulo en nian metiejojn, por aĉeti ajnan juvelaron. Kiam li nun vidis belan kolĉenon, kiun mi estis farinta, li batetis min kun afabla mieno sur la ŝultron, dum li, okulumante la ornamaĵon, diris: `Ej, ej! mia kara amiko, tio estas ja ege bona artaĵo. Mi fakte ne scius, kiu alia superus vin, se ne René Cardillac, kiu sendube estas la plej bona oraĵisto, kiu ekzistas en la mondo. Al tiu vi devus iri, kun ĝojo li akceptos vin en sian metiejon, ĉar nur vi povus helpi lin dum lia artoriĉa kreado, kaj nur de li sole vi povas viavice ankoraŭ lerni.`

La vortoj de la fremdulo estis falintaj profunden en mian animon. Mi ne havis plu trankvilon en Ĝenevo, fortege mi sentis min fortirata. Fine mi sukcesis liberigi min de mia majstro. Mi venis al Parizo. René Cardillac akceptis min senemocie kaj malafable. Mi ne regresis, li devis doni al mi

laboron, kiel malgranda ĝi eble povis esti. Li ordonis al mi la faradon de eta ringo. Kiam mi transdonis al li la laboritaĵon, li fikse rigadis min kun siaj scintilantaj okuloj, kvazaŭ li volis enrigardi en mian plejan internon. Tiam li diris: `Vi estas lerta, brava ulo, vi povas translokiĝi al mi kaj helpi min en la metiejo. Mi pagos al vi bone, vi estos kontenta pri mi.` Cardillac plenumis sian vorton.

Mi estis estinta jam kelkajn semajnojn ĉe li, sen esti vidinta Madelon, kiu tiam, se mi ne eraras, estis en la ruo ĉe iu ajn onklino de Cardillac. Fine ŝi alvenis. Oh, vi eterna potenco de la ĉielo! Kio okazis al mi, kiam mi vidis la anĝelan bildon! Ĉu iam iu homo amis kiel mi? Kaj nun ...! – Oh, Madelon!“ Oliviero pro tristeco ne plu kapablis paroli. Li metis ambaŭ manojn antaŭ la vizaĝon kaj singultis vehemente. Fine superante la akran doloron, kiu estis kaptinta lin, li plue parolis: „Madelon alrigardis min kun amindaj okuloj. Ŝi venis pli kaj pli ofte en la metiejon. Kun ravo mi rimarkis ŝian amon. Kiel ajn severe la patro nin observis, kelka sekreta manpremo validis kiel signo de interkonsentita ligo; Cardillac ŝajnis percepti nenion. Mi pensis, kiam mi estos gajninta lian favoron kaj atinginta la majstrecon, mi povos svati min por Madelon. – Iun matenon, kiam mi intencis komenci mian laboron, Cardillac starigis sin antaŭ mi kun kolero kaj malestimo en la vizaĝo. `Mi ne plu bezonas vian laboron`, li ekparolis, `for el mia domo ankoraŭ en ĉitiu horo, kaj neniam permesu al vi esti vidata antaŭ miaj okuloj! La kaŭzon, pro kiu mi ne plu povas toleri vin ĉitie, mi ne bezonas diri al vi. Por vi, povra ulaĉo, la dolĉa frukto, al kiu vi strebas, pendas tro alte!` Mi volis paroli, sed li pakis min per forta pugno kaj ĵetis min el la pordo tiel, ke mi falegis teren kaj tre vundis min ĉe la kapo kaj la brako. – Indignita, disŝirita de kolerplena doloro mi iris for el la domo kaj trovis finfine ĉe la plej ekstrema limo de la antaŭurbo Sankta Martin bonkoran konatulon, kiu min akceptis en sian subtegmentan ĉambreton. Mi ne havis kvieton nek ripozon. Dum la nokta tempo mi kaŝiris ĉirkaŭ la domo de Cardillac, opiniante, ke Madelon aŭskultos miajn ĝemojn, mian lamentadon, ke ŝi eble sukcesos paroli de sur la fenestro kun mi sen subaŭskultanto. Plej diversaj aŭdacaj ideoj interkruciĝis en mia cerbo, al kies efektivigo mi esperis persvadi ŝin.

Al la domo de Cardillac en la strato Nicaise aliĝas alta muro kun niĉoj entenantaj malnovajn, duone dispecigitajn ŝtonfigurojn. Dum iu nokto mi staras proksime al unu el tiaj ŝtonfiguroj kaj spektas supren al la fenestroj de la domo, kiuj direktiĝas al la korto, kiun ĉirkaŭas la muro. Tiam mi subite vidas lumon en la metiejo de Cardillac. Estas noktomezo, neniam antaŭe Cardillac je tiuĉi horo estis sendorma, li kutimis enlitiĝi precize je la naŭa. En mi batas la koro pro timema supozo, mi imagas iun ajn eventon, kiu eble malfermos al mi la eniron. Sed la lumo tuj denove malaperas. Mi premas min al la ŝtona figuro, enen en la niĉon, sed terurigita mi resaltas, kiam mi sensas kontraŭpremon kvazaŭ la figuro estus viviĝinta. En la krepuska glimo de la nokto mi nun rimarkas, ke la ŝtono lantmove turniĝas kaj malantaŭ ĝi elglitas obskura figuro, kiu kun mallaŭtaj paŝoj malsupreniras laŭ la strato. Mi saltas al la ŝtona figuro, ĝi staras sammaniere kiel antaŭe tute proksime al la muro. Instinkte, kiel pelita de interna potenco, mi kaŝe postsekvas la ulon. Ĝus ĉe figuro de la Sankta Maria la ulo ĉirkaŭspektas, la plena lumo de hela lampo, kiu brulas antaŭ la bildo lumigas ties vizaĝon: Estas Cardillac! Nekomprenebla timo, hanteca hororo invadas min. Kiel per magio fikssorĉita mi devas sekvi la fantomecan noktomigranton. Tia mi opinias la majstron, kvankam ne estas la tempo de la plena luno, dum kiu tia hantaĵo mistifikas la dormantojn. Fine Cardillac malaperas flanken en la profundan ombron. Pro eta, al mi bone konata tuseti mi tamen rimarkas, ke li paŝis sub la pordegon de iu domo. Kion signifas tio, kion li entreprenos? Tiel mi demandas min plena de ekmiro kaj premas min dense al la domoj. Daŭras ne tre longe, jen alvenas kantante kaj trilante viro kun brila egreto kaj tintantaj spronoj. Kiel tigro sur sian predon Cardillac ĵetas sin el sia kaŝejo sur la viron, kiu sammomente sinkas stertorante teren. Kun krio de ekteruriĝo mi alsaltas, Cardillac atakas la viron, kiu kuŝas surtere. – `Majstro Cardillac, kion vi faras?` mi vokas laŭte. – `Malbenito!` kriegas Cardillac, kuregas fulmrapide preter mi kaj malaperas. Tute ekster mi, preskaŭ ne kapabla je la paŝoj, mi proksimiĝas al la sternita ulo. Mi surgenuiĝas apud li; eble, mi pensas, li estas ankoraŭ savebla, sed neniu eta signo de vivo estas ankoraŭ en li.

En mia angoro mi preskaŭ ne rimarkas, ke la Maréchaussée ĉirkaŭis min. `Jam denove unu teren batita far la diabloj – hej, hej – juna homo, kion vi faras ĉitie? Ĉu vi estas unu el la bando? For kun vi!` Tiel ili krias pelmele kaj kaptas min. Mi preskaŭ ne kapablas balbute paroli, ke mi tian fifaraĵon ja tute ne estus povinta fari kaj ke ili lasu min foriri en paco. Tiam unu levas lumon antaŭ mian vizaĝon kaj vokas ridante: `Tiu ja estas Oliviero Brusson, la metiasistanto de la oraĵisto. Li laboras ĉe nia honesta, brava majstro René Cardillac! – Jes, tiu murdos la homojn surstrate, he! – ĵuste tio ŝajnas al mi – estas ĵuste laŭ la maniero de la murdemuloj, ke ili lamentadas apud la kadavro kaj lasas sin kapti, ĉu? – Kiel okazis tio, knabo? – rakontu aŭdace.` – `Malproksime de mi`, mi diris, `homo saltatakis tiun, puŝis lin teren kaj fulmrapide forkuregis, kiam mi laŭte ekkriis. Mi volis ja vidi, ĉu la terenbatita estus savebla.` `Ne, mia filo`, vokas unu el tiuj, kiuj estis suprenlevintaj la kadavron, `tiu estas morta, tra la koro, kiel kutime, iras la stiletpiko.` – `Diablon!` diras alia, `denove ni venis tro malfrue kiel antaŭhieraŭ`; poste ili foriris kun la kadavro.

Kiel mi sentis min, mi tute ne povas diri; mi sentis min, kvazaŭ malbona sonĝo ŝerce provokus min; ŝajnis al mi, ke mi devus tuj vekigi kaj miri pri la petola iluziaĵo: Cardillac, la patro de mia Madelon, abomena murdisto?! Mi estis senforte sinkinta sur la ŝtonajn ŝtupojn de iu domo. Pli kaj pli supren krepuskis la mateno, oficirĉapelo, riĉe ekipita per plumoj, kuŝis antaŭ mi sur la pavimo. La sanga faritaĵo de Cardillac, realigita ĉiloke, kie mi sidis, aperis hele antaŭ mi. Terurigita mi kuregis for.

Komplete konfuzita, preskaŭ senkonscia mi sidas en mia subtegmenta ĉambreto, jen malfermiĝas la pordo kaj René Cardillac envenas. `Pro Kristo! Kion vi volas?` mi alkrias lin. Li, ne konsiderante tion, venas renkonte al mi kaj alridetas min kun kvieto kaj afableco, kiuj pliigas mian internan abomenon. Li alŝovas malnovan, kadukan skabelon pli proksimen kaj sidiĝas apud mi, kiu ne sukcesas levi min de sur la pajlokuŝejo, sur kiun mi estis ĵetinta min. `Nu, Oliviero`, li ekparolas, kiel vi fartas, povra knabo? Mi fakte malafable trorapidis, kiam mi forpuŝis vin el la domo, vi mankas al mi ĉie ajn. Ĝus mi planas verkon, kiun mi ne povas fini sen via helpo. Kion vi pensus, se vi denove laborus en mia metiejo? – Vi silentas, ĉu? – Jes, mi scias, mi ofendis vin. Mi ne volis kaŝi al vi, ke mi estis ĉagrenita pro la flirto kun mia Madelon. Tamen pli poste mi sufiĉe trankvile pripensis la aferon kaj rezonis, ke konsidere al via lerteco, via diligenteco, via fideleco mi ne povas deziri pli bonan bofilon ol ĝuste vin. Do, venu kun mi kaj vidu, kiamaniere vi povas akiri Madelon kiel edzinon.`

La vortoj de Cardillac tratanĉis mian koron, mi ektemis pro lia malico, mi ne kapablis eligi ajnan vorton. `Vi hezitas`, li plue diris nun kun akra tono, dum liaj brilegantaj okuloj traboris min, `hezitas, ĉu? – eble vi hodiaŭ ankoraŭ ne povas veni kun mi, vi havas aliajn intencojn! – eble vi volas viziti Desgraison aŭ eĉ prezenti vin ĉe d'Argenson aŭ La Regnie. Gardu vin, knabaĉo, ke la ungegoj, kiujn vi volas ellogi por la perdigo de aliaj homoj, ne kaptos kaj disŝiros vin mem!` – Ĉimomente mia profunde ĉagrenita animo subite liberigas sin. `Sentu tiuj`, mi vokas, `sentu tiuj, kiuj konscias pri terura krimfaro tiujn nomojn, por mi tiuj ne necesas – min tiuj ne ĝenas.` – `Vere`, daŭrigas Cardillac, `vere, Oliviero, estas honoro por vi, se vi laboras ĉe mi, ĉe la ĉitempe plej fama majstro, ĉie atestimata pro lia arto, ĉie atestimata pro lia fideleco kaj honesteco tiel, ke ĉiu malbonvola kalumnio refalus forte sur la kapon de la kalumnianto. –

Nu, kio rilatas al Madelon, mi devas nun konfesi al vi, ke vi dankas mian indulgemon sole al ŝi. Ŝi amas vin kun tia vehemenco, kian mi ne kredis ĉe la sensiva knabino. Tuj, kiam vi estis for, ŝi faligis sin antaŭ miaj piedoj, ĉirkaŭprenis miajn genuojn kaj konfesis sub mil larmoj, ke ŝi ne plu povas vivi sen vi. Mi pensis, ke ŝi tion nur iluzias al si, kiel ja kutime okazas ĉe enamiĝintaj junulinoj, ke ili tuj volas morti, kiam la unua laktokolora vizaĝo afable rigardas ilin. Sed vere, mia Madelon iĝis nekuracebla kaj malsana, kaj kiam mi volis dekonduki ŝin de la frenezaĵo, ŝi vokis centoble vian nomon. Kion mi povis fari, se mi ne malesperigus ŝin? Hieraŭ vespere mi diris al ŝi, ke mi konsentas al ĉio kaj hodiaŭ venigos vin. Jen ŝi ekfloris kiel rozo kaj nun atendas vin tute ekster si pro amsopiro.` – La eterna potenco de la ĉielo pardonu min, sed mi mem ne scias, kiel okazis, ke mi

subite staris en la domo de Cardillac, ke Madelon, laute ekjubilante: `Oliviero – mia Oliviero – mia amato – mia edzo!`, ĵetis sin sur min, ĉirkaŭprenis min per ambaŭ brakoj, premis min forte al sia brusto tiel, ke mi en la eksceso de la plej alta raviĝo ĵuris pro la Virgulino kaj ĉiuj sanktuloj, neniam, neniam forlasi ŝin!“

Emociita pro la memoro al tiu decida momento Oliviero devis paŭzi. La Scuderi, plena de hororo koncerne la nigrofaron de viro, kiun ŝi estis opinianta la virto, la honesteco mem, vokis: „Terure! – Ĉu René Cardillac apartenas al la murdista bando, kiu tiom longe faris nian urbon rabistejo?“ – „Kion Vi diras, mia fraŭlino“, diris Oliviero, „al la bando, ĉu? Neniam ekzistis tia bando. Cardillac sola estis tiu, kiu per abomeninda agado trovis en la tuta urbo siajn buĉviktimojn. La fakto, ke li sole estis tiu, kun ĉitio estas ligata la sekureco, kun kiu li realigis siajn batojn, la nevenkebla malfacileco, por malkovri la spuron de la murdisto. – Sed lasu min daŭrigi! La sekvonta rakonto klarigos al Vi la misterojn de la plej abomeninda kaj samtempe plej malfeliĉa el ĉiuj homoj. – La situacion, en kiu mi nun troviĝis ĉe la majstro, tiun ĉiu facile imagu al si. La paŝo estis farita, mi ne povis retiriĝi. Kelkfoje mi havis la senton, kvazaŭ mi mem iĝintus la murdisthelpanto de Cardillac; nur pro la amo de Madelon mi forgesis la internan turmenton, kiu torturis min, nur proksime al ŝi mi povis sukcese forigi ĉiun videblan spuron de neeldirebla aflikto. Kiam mi laboris kun la oldulo en la metiejo, mi ne kapablis rigardi en lian vizaĝon, preskaŭ ne diri unu vorton pri la hororo, kiu min skuis en la proksimeco de la teruriga homo, kiu plenumis ĉiujn virtojn de fidela, molkora patro, de bona civitano, dum kontraŭe la nokto vualigis lian krimfaradon. Madelon, la fidela, anĝelpura infano, amis lin kvazaŭ idolon. Traboris al mi la koron, kiam mi pensis, ke ŝi, kaze ke iam ajn la venĝo trafus la venĝo la senmaskitan malbonulon, ŝi ja, seniluziigita per la infera ruzo de la diablo, devus esti venkata de ekstrema malespero. Jam tio fermis al mi la buŝon, eĉ se mi pro tio devintus suferi la morton de krimulo. Kvankam mi el la diraĵoj de la Maréchaussée povis sufiĉe konkludi la fifaraĵojn de Cardillac, ties motivo, la maniero de ties realigado, restis al mi enigmo. Sed la solvo ne forestis longe.

Unu tagon Cardillac, kiu alitempe, ekcitantan mian abomenon, dum la laborado estintus en plej gaja humoro, ŝercis kaj ridis, ĉi foje estis tre morna kaj pripensema. Subite li ĵetis la juvelornamaĵon, pri kiu li ĵus verkis, flanken tiel, ke la ŝtonoj kaj perloj disrulis, ekstaris kaj diris: `Oliviero! – ne povas resti tiel inter ni ambaŭ, ĉitio interrilato estas por mi maltolerebla. – Kion malkovri ne sukcesis la plej artifika ruzeco de Desgrais kaj ties kompanaro, tion la hazardo kikis en viajn manojn. Vi vidis min dum mia nokta agado, al kiu pelas min mia fatala astro, nenia rezisto eblas. Estis ankaŭ via malbona stelo, kiu efikis sekvi min, kiu kovris vin per neprenetrebila vualo, kiu donis al via paŝado la malpezecon, ke vi paŝis neaŭskulteble kiel la plej eta besto tiel, ke mi, kiu en la plej profunda nokto vidas klare kiel la tigo, mi, kiu aŭskultas la plej etan sonon, la zumadon de la kulo, ne rimarkis vin. Via malbona stelo kondukis vin, mian kunulon, al mi. Malkaŝo estas laŭ la situacio, en kiu vi nun troviĝas, ne plu imagebla. Pro tio vi devas scii ĉion!` – `Neniam mi estos via kamerado, hipokrita malbonulo.` – Tiamaniere mi volis ekkrii, sed la interna teruro, kiu estis kaptinta min ĉe la vortoj de Cardillac, strangolis mian gorĝon. Anstataŭ vortojn mi sukcesis eligi nur nekomprenblan sonon. Cardillac eksidis denove sur sian laborseĝon. Li sekigis al si la ŝviton for de la frunto. Li ŝjanis, akre emociita de la memoro pri pasintaĵo, pene ekregis sin. Fine li ekrakontis:

`Saĝuloj parolas multon pri la strangaj impresoj, pri kiuj virinoj gravedaj kapablas, pri la miriga influo de tia viva, senvola impresado de ekstere sur la infanon. Pri mia patrino oni rakontis al mi strangan okazintaĵon: Kiam tiu estis graveda en la unua monato, ŝi kun aliaj virinoj spektis brilegan kortegofeston, kiu eventis en la *Triano*<sup>34</sup>. Tiam renkontis ŝia rigardo kavaliron en hispana vestaĵo kun brilanta juvelĉeno ĉirkaŭ la kolo. De ĝi ŝi ne plu povis forturni la okulojn. Ŝia tuta estado konsistis en la avido al la briletantaj ŝtonoj, kiujn ŝi opiniis supernatura aĵo. Tiu sama kavaliro antaŭ jaroj, kiam mia patrino ankoraŭ ne estis edziniĝinta, estis insidiinta kontraŭ ŝia virto,

<sup>34</sup> plezurkastelo en la parko de Versailles

sed estis repuŝita kun abomeno. Mia patrino rekonis lin, sed nun ŝi opiniis, ke li en la gloro de la brilantaj diamantoj estas estaĵo de pli alta ĝenro, la esenco de ĉiu beleco. La kavaliro rimarkis la sopirplenajn, ardajn rigardojn de mia patrino. Li sukcese provis alproksimiĝi al ŝi, eĉ plie, forlogi ŝin for de ŝiaj gekonatumuloj al senhoma loko. Tie li fervorege brakumis ŝin, mia patrino kaptis la belan ĉenon, sed en la sama momento li sinkis malsupren kaj tiregis mian patrinon kun si sur la teron. Eble estis trafinta lin apopleksio aŭ pro alia kaŭzo; sufiĉe, li estis morta. Vana estis la penado de mia patrino, liberigi sin el la per la mortokramfo rigidiĝintaj brakoj de la kadavro. La kavaj okuloj, kies vidpovo estis estingiĝinta, celitaj al ŝi, la mortulo ruliĝis kun ŝi sur la grundo. Ŝia akresona helpkriado penetris finfine ĝis al homoj malproksime preterpasantaj. Tiuj alkuris kaj savis ŝin el la brakoj de la fantomeca amanto. La terurego ĵetis mian patrinon kun gravega malsano sur la liton. Oni opiniis ŝin, min perditaj, sed ŝi resaniĝis kaj la akuŝo estis pli feliĉa ol oni povintus iam esperi. Sed la teroroj de tiu terura momento estis trafintaj min. Estis leviĝinta mia fatala astro kaj estis pafinta malsupren fajrero, kiu ekflamigis en mi unu el la plej strangaj kaj plej perdigaj pasioj. Jam dum mia plej frua infanaĝo mi ŝatis pli ol ĉion alian brilajn diamantojn, oran juvelaron. Oni taksis tion kutima infaneca inklino. Sed montriĝis alimaniere, ĉar kiel knabo mi ŝtelis oron kaj juvelojn, kie ajn mi kapablis havigi ilin al mi. Same kiel la plej lerta eksperto mi povis diferencigi instinkte veran juvelaron disde la falsa. Nur ĉilasta logis min, falsan kaj pregitan oron mi rezignis sen atento. La ennaskita avido devis cedi al la kruelaj punoj fare de mia patro. Nur por okupi min pri oro kaj altvaloraj ŝtonoj mi turnis min al la metio de oraĵisto. Mi laboris kun pasio kaj baldaŭ mi iĝis la unua majstro en ĉi tiu profesio.

Nun komenciĝis periodo, en kiu la ennaskita inklino, tiom longe subpremita, perforte urĝiĝis alten kaj potence kreskis forkonsumante ĉion ĉirkaŭan. Kiam mi estis finverkinta ian juvelaron kaj estis transliverinta ĝin, mi falis en malkvieton, en senkonsolecon, kiuj rabis al mi dormon, sanon, kuraĝon al vivo. – Kiel fantomo tage kaj nokte staris antaŭ miaj okuloj la persono, por kiu mi estis laborinta, ornamita kun mia juvelaro, kaj voĉo flustris en miajn orelojn: Ĝi estas ja via – ĝi estas ja via – ek, prenu ĝin! – kion utilas la diamantoj al la mortinto? – Tiam mi finfine dediĉas min al ŝtelado. Mi havis la eblecon iri en la domojn de la nobeluloj, rapide mi uzis ĉiun okazon, nenia seruro kontraŭstaris mian lertecon, kaj post mallonga tempo la ornamaĵo, kiun mi estis farinta, estis denove en miaj manoj. – Sed nun ankaŭ tio ne forpelis mian maltrankvilon. Tiu fantomeca voĉo tamen aŭskultigis sin kaj mokis min kaj vokis: Hej, hej, vian juvelaron portas nun mortinto! – Mi mem ne sciis, kiel okazis, ke mi direktigis sendireblan malamon kontraŭ tiuj, al kiuj mi estis farinta la ornamaĵon. Ja, en la plej profunda interno kontraŭ tiuj ekmoviĝis murdemo, antaŭ kiu mi mem ektemis. –

Dum tiu tempo mi aĉetis ĉitium domon. Kun la posedanto mi estis akordiĝinta pri la prezo, ĉitie en tiu ĉi ĉambro ni sidis kune gajaj pri la kontraktita negoco kaj trinkis botelon da vino. Estis noktiĝinta, mi deziris hejmeniĝi, jen diris mia vendinto: Aŭskultu, majstro René, antaŭ ol vi foriras, mi devas konigi al vi sekreton de ĉitium domo. Tiam li malfermis tiun en la muro tie enmetitan ŝrankon, forŝovis la malantaŭan vandon, eniris ĉambreton, kliniĝis malsupren kaj levis supren plankopordon. Krutan, mallarĝan ŝtuparon ni iris malsupren, atingis mallarĝan pordeton, kiun li malŝlosis, eliris en la vastan korton. Nun la olda sinjoro, mia vendinto, paŝis al la muro, manipulis ĉe nur iomete elstaranta feraĵo, kaj tuj volviĝis peco de la muro tiel, ke homo povis komforte gliti tra la aperturo kaj atingi la straton.

Vidu, Oliviero, iam la artan konstruaĵon, kiun verŝajne ruzaj monaĥoj de la monaĥejo, kiu iam situis ĉitie, estis konstruintaj por povi sekrete el- kaj engliti. Estas peco de ligno, nur de ekstere morterumita kaj surkalkita, en kiun de ekstere estas enmetita figurkolono, ankaŭ el ligno, sed laŭaspekte tute kiel ŝtono, kiu volviĝas same kiel la figurkolono sur kaŝitaj hingoj. – Nigraj ideoj leviĝis ene de mi, kiam mi vidis ĉitium instalaĵon, ŝajnis al mi, kvazaŭ estus jam preparite al tiaj farenaĵoj, kiuj por mi mem estis ankoraŭ sekreto. Ĝus mi estis transdoninta al iu kortegulo riĉan ornamaĵon, kiu – tion mi scias – estis destinita al dancistino de la opero. La mortiga torturo ne restis



for – la fantomo gluiĝis al miaj paŝoj – la lispanta satano al mia orelo! – Mi translokiĝis en la domon. Malseka pro sangeca timŝvito mi volviĝis sendorme sur la kuŝejo. Mi vidas en mia spirito la homon kaŝirantan al la dancistino kun mia ornamaĵo. Plena de kolero mi eksaltas – ĉirkaŭĵetas la mantelon – descendas la sekretan ŝtuparon – for tra la muro al la strato Nicaise. – Li venas, mi invadas lin, li ekkrias, sed al la de malantaŭe forte kaptita mi puŝas la stileton en la koron – la ornamaĵo estas la mia! – Farinte tion mi sentas kvieton, kontenton en mia animo, kian alitempe neniam. La fantomo estis for, la voĉo de la satano silentis. Nun mi sciis, kion deziris mia malica stelo, mi devis cedi al li aŭ perdiĝi! – Vi nun komprenas mian tutan agadon kaj faradon, Oliviero, ĉu?

Ne kredu, ke pro tio, kial mi devas fari, kion mi ne povas lasi, mi absolute rezignis pri la sento de kompatato, de bedaŭro, kiuj laŭdire estas kondiĉoj de la homa naturo. Vi scias, kiel malfacila estas por mi la liverado de iu ornamaĵo, ke mi ne laboras por kelkaj, kies morton mi ne deziras, ja eĉ kiel, sciante ke la sekvontan tagon sango forpelos mian fantomon, hodiaŭ mi kontentas per forta pugnobato, kiu teren sternas la posedanton de mia valoraĵo kaj liveras tion en mian manon. –

Dirinte tion ĉion, kondukis min Cardillac en la sekretan volbitan ejon kaj permesis al mi rigardi lian trezorkabineton. La reĝo ne posedas pli riĉan. Ĉe ĉiu ornamaĵo estis precize notita sur aldonita slipeto, por kiu farita, kiam forprenita per ŝtelado, rabado aŭ murdado. `Je via edziĝtago`, diris Cardillac obtuze kaj solene, `je via edziĝtago, Oliviero, vi, metante la manon sur la bildon de la krucumita Kristo, ĵuros al mi sanktan ĵuron, ke vi post mia morto neniigos ĝispolve ĉitium tutan riĉaĵon per rimedoj, kiujn mi tiam konigos al vi. Mi ne volas, ke iu homa estaĵo, nepre ne Madelon kaj vi, iĝos posedantoj de la kun sango reakirita trezoraĵo.`

Kaptita en ĉitium labirinto de krimo, disŝirita inter amo kaj abomeno, inter delico kaj hororo, mi estis komparenda kun tiu malbenito, kiun dolĉa anĝelo milde ridetante vinkas supren, sed per ardantaj ungegoj firmitenas lin la satano, kaj la amrideto de la pia anĝelo, en kiu speguliĝas ĉiu beateco de la alta ĉielo, iĝas al li la plej terura el liaj suferoj. Mi pensis pri fuĝo, ja, eĉ pri memmortigo – sed Madelon! Skoldu min, riproĉu min, mia honorinda fraŭlino, ĉar mi estis tro malforta por venki kun fortego pasion, kiu katenis min al la krimo. Sed ĉu mi ne pentos pro tio per hontinda morto? – Iun tagon Cardillac venis hejmen eksterordinare gaja. Li karesis Madelonon, sendis al mi la plej afablajn rigardojn, trinkis ĉetable botelon da altkvalita vino, kian li kutimis trinki je altaj festaj kaj solenaj tagoj, kantis kaj jubilis. Madelon estis foririnta, mi estis irona en la metiejon: `Restu sidanta, knabo`, vokis Cardillac, `hodiaŭ nenian laboron plu! ni trinku ankoraŭ unu je la bonfarto de la plej honorplena, plej aprezinga damo en Parizo! Post kiam mi estis tintiginta kun li la glason kaj li estis fintrinkinta la sian, li diris: `Diru sincere, Oliviero, kiel plaĉas al vi la versoj: *Un amant qui craint les voleurs, n'est point digne d'amour!*`

Tiam li rakontis, kio okazis en la salonoj de la Maintenon kun Vi kaj la reĝo, kaj li aldonis, ke li jam de ĉiam adoris Vin kiel neniun alian homan estaĵon kaj ke Vi, havanta tiel altan virton, antaŭ kiu la fatala astro senforte paliĝas, eĉ portanta la plej belan de li faritan ornamaĵon, Vi neniam incitus en li la malican fantomon, murdopensojn. `Aŭskultu, Oliviero`, li diris, `al kio mi decidiĝis: Antaŭ longa tempo mi devis fari kolornamaĵon kaj braceletojn por Henriette de Anglujo<sup>35</sup> kaj al tio mem liveri la ŝtonojn. La artaĵo sukcesis al mi kiel neniua alia, sed disŝiriĝis mia brusto, pensante, ke mi devos disigi min de la ornamaĵo, kiu estis estiĝinta mia plej ŝatata valoraĵo. – Vi konas la malfeliĉan insidmurdon de la princino. Mi retenis la juvelaron, kaj nun mi deziras sendi ĝin kiel signon de mia respekto, de mia dankemo al la fraŭlino de Scuderi en la nomo de la persekutata bando. – Krom ke la Scuderi ricevas la evidentan signon de ŝia triumfo, mi ridindigas ankaŭ Degraison kaj ties komplikojn, kiel ili meritas tion. Vi portu la ornamaĵon al ŝi.` – Kiam Cardillac

<sup>35</sup> *Henriette Anna (1644 – 1679) estis la plej juna filino de la reĝo Karlo I. de Anglujo, edzino de la duko Philipp de Orleans kaj per li la bofratino de la reĝo Ludoviko XIV.; pro ŝia antaŭtempa morto estiĝis la malvera onidiro, ke ŝi estis murdata per veneno.*

menciis Vian nomon, fraŭlino, estiĝis al mi, kvazaŭ estus fortirataj nigraj vualoj kaj la bela, hela imago de mia feliĉa frua infanaĝo denove leviĝus en buntaj brilaj koloroj. Invadis mian animon belega konsolo, radio de espero, antaŭ kiu malaperis la nigraj spiritoj.

Eble Cardillac rimarkis la impreson, kiun estis efektivantaj liaj vortoj, kaj li interpretis ĝin laŭ sia maniero. `Al vi ŝajnas plaĉi mia plano`, li diris. `Mi povas ja konfesi, ke iu profunde interna voĉo, tute diversa de tiu, kiu postulas sangoviktimojn kiel vorema rabobesto, ordonis al mi, ke mi faru tion. Kelkfoje iĝas strange in mia animo – ajna interna timo antaŭ io terura, kies hororo blovas ĉitransen el la fora alia mondo en la tempon, kaptas min perforte. Tiam eĉ estas al mi, kvazaŭ tio, kion la fatala astro efikis far mi, povus esti atribuata al mia senmorta animo, kiu ne partoprenas en ĝi. En tia animstato mi decidis fari belan diamantkronon por la Sankta Virgulino en la preĝejo de St. Eustache<sup>36</sup>. Sed tiu nekomprenebla timo atakis min pli forte ĉiam, kiam mi volis komenci la laboron; sekve mi tute preterlasis ĝin. Nun estas al mi, kvazaŭ mi humile donas oferon al la virto kaj pieco mem kaj petegas efikan pledon, sendante al la Scuderi la plej belan ornamaĵon, kiun mi iam verkis.` – Cardillac, plej bone konante Vian vivmanieron, mia fraŭlino, indikis nun al mi la manieron kaj tielon kaj ankaŭ la horon, kiel kaj kiam mi liveru la ornamaĵon, kiun li ŝlosis en belan kesteton. Mia tuta estado estis raviĝo, ĉar la ĉielo mem montris al mi helpe de la krima Cardillac la vojon por savi min el la infero, en kiu mi, elpuŝita pekulo, suferis. Tiel mi pensis.

Tute kontraŭ la volo de Cardillac mi intencis atingi Vin. Kiel filo de Anne Brusson, kiel de Vi zorgita infano mi pensis ĵeti min antaŭ Viajn piedojn kaj ĉion – ĉion malkovri al Vi. Certe Vi, emociita per la neeldirebla mizero, kiu minacis la povran, senkulpan Madelonon en kazo de malkaŝado, prisilentus la sekreton, sed Via alten celanta, sagaca spirito certe estus trovinta maldanĝerajn rimedojn, sen misstiri tiun malkovron de la abomeninda malico de Cardillac. Ne demandu min, en kio estus konsistintaj tiuj rimedoj; mi ne scias. Sed ke Vi Madelonon kaj min savintus, pri tio la konvinko firme estis en mia animo samkiel la kredo pri la konsoloriĉa helpo de la Sankta Virgulino. Vi scias, fraŭlino, ke mia intenco malsukcesis en tiu deprima punkto. Mi ne perdis la esperon esti alian fojon pli bonŝanca.

Tiam okazis, ke Cardillac perdis ĉiun gajecon. Li morne ĉirkaŭiradis, fikse rigardis antaŭ sin, murmuris nekompreneblajn vortojn, batalante per la manoj por repuŝi ion kontraŭan, ŝajnis ke lia spirito estis turmentata per mavaj pensoj. Tiamaniere li kondukis dum la tuta mateno. Finfine li eksidis al la labortablo, eksaltis denove malbonhumore, rigardis tra la fenestro, parolis grave kaj sombre: `Mi ja estus dezirinta, ke Henriette de Anglujo estus portinta mian ornamaĵon!` – Tiuj vortoj plenigis min kun teroro. Nun mi sciis, ke lia freneza spirito estis kaptita de la abomena murdfantomo, ke la voĉo de la satano denove estis aŭdiĝinta en liaj oreloj. Mi imagis Vian vivon minacata per la abomeninda murdodiablo. Se Cardillac denove havintus sian ornamaĵon en la manoj, tiam Vi estintus savita. En ĉiu momento kreskis la danĝero. Tiam mi renkontis Vin sur la Pontneuf, puŝiĝis min al Via kaleŝo, alĵetis al Vi la slipon, kiu ĵure petegis Vin, ke Vi tujege enmanigu la ricevitan ornamaĵon al Cardillac. Vi ne venis. Mia timo altiĝis ĝis al la malespero, kiam la alian tagon Cardillac parolis pri nenio alia ol pri la belega ornamaĵo, kiu dum la punkto estis hantinta antaŭ liaj okuloj. Tion mi ne povis alimaniere interpreti ol Vian ornamaĵon, kaj al mi iĝis klare, ke li cerbumis pri iu murdatako, kiun li certe jam estis planinta efektiviĝi dum la punkto. Mi devis savi Vin ankaŭ koste de la vivo de Cardillac.

Kiam Cardillac post la vespro kiel kutime estis enŝlosinta sin, mi descendis tra la fenestro en la korton, glitis tra la aperturo en la muro kaj stariĝis proksime en la profunda ombro. Daŭris nelonge, ĝis Cardillac elvenis kaj mallaŭte kaŝiris antaŭen laŭ la strato. Mi sekvis lin. Li iris en la direkto al la strato St. Honoré; al mi tremis la koro. Subite Cardillac estis malaperinta. Mi decidis stariĝi apud Via dompordo. Jen pasas kantante kaj trilante samkiel tiam, kiam la hazardo faris min spektanto de

---

<sup>36</sup> Ĉitiu preĝejo situas proksime de la Louvre; la sanktulo, al kiu ĝi estas dediĉita, estas la patrono de la ĉasistoj.

la murdfaro de Cardillac, oficiro preter mi sen rimarki min. Sed en la sama momento nigra figuro elsaltas kaj atakas lin. Estas Cardillac. Tiun murdon mi volas malebligi; kun laŭta krio mi estas per du-tri saltoj ĉeloke. – Ne la oficiro, Cardillac sinkas morttrafita stertorante teren. La oficiro lasas fali la ponardon, tiregas la spadon el la ingo, starigas sin, opiniante min la komplico de la murdisto, batalprete kontraŭ mi, sed forkuras rapide, kiam li rimarkas, ke mi, sen atenti pri li, nur ekzamenas la kadavron. Cardillac ankoraŭ vivis. Mi ŝarĝis lin, enpoŝiginte la ponardon, kiun la oficiro estis lasinta fali, sur la ŝultrojn kaj pene portis lin hejmen kaj tra la sekreta koridoro supren en la metiejon. – La alio estas al Vi konata. Vi vidas, mia estimata fraŭlino, ke mia unusola krimo konsistas en tio, ke mi ne malkaŝis la patron de Madelon al la juĝejoj, tiel finante liajn nigrofarojn. De ĉiu sangodelikto mi estas pura. – Neniu torturo eligos el mi la sekreton pri la fiagoj de Cardillac. Mi ne volas, ke spite al la eterna potenco, kiu kaŝis al la virta filino la teruran sangokulpon de la patro, la tuta mizero de la pasinteco, de ŝia tuta estado, ankoraŭ nun mortigante falu sur ŝin, ke ankoraŭ nun la monda venĝo elfosu la kadavron el la tero, kiu kovras ĝin, ke ankoraŭ nun la ekzekutisto brulmarku la putrintajn ostojn. – Ne! La amatino de mia animo priploros min kiel la senkulpe falintan; la tempo mildigos ŝian aflikton, sed ne venkebla estus la lamento pri la terurigaj inferaj fifaroj de la amata patro!“

Oliviero silentis, sed nun elfluis torento da larmoj el liaj okuloj; li ĵetis sin antaŭ la piedojn de la Scuderi kaj petegis: „Ĉu Vi estas konvinkita pri mia senkulpeco? Certe, Vi estas! Kompatu min, diru, kiel fartas Madelon?“ – La Scuderi vokis la Martinièren, kaj post malmultaj momentoj Madelon flugis al la kolo de Oliviero. „Nun ĉio estas bona, ĉar vi estas ĉitie – mi ja sciis, ke la plej grandanima damo savos vin!“ Tiel vokis Madelon ĉiam denove, kaj Oliviero forgesis sian sorton, ĉion, kio minacis al li, li estis libera kaj feliĉega. Ambaŭ plej emociige plendis al si, kion ili reciproke estis suferintaj, kaj ĉirkaŭbrakis sin denove kaj larmis pro raviĝo, ĉar ili estis denove trovintaj sin. – Se la Scuderi ne jam estus konvinkita pri la senkulpeco de Oliviero, al ŝi devintus esti ĝi la kredo pri ĝi nun, kiam ŝi rigardis ambaŭ, kiuj en la beateco de la plej kora amligo forgesis la mondon kaj sian mizeron kaj siajn neeldireblajn suferojn. „Ne“, ŝi vokis, „pri tia beata forgeseco disponas nur pura koro.“

La helaj radioj de la mateno jam brilis tra la fenestro. Desgrais batis singarde al la pordo kaj memorigis, ke estas tempo por forkonduki Olivieron Brusson, ĉar tio pli malfrue ne povus okazi sen kaŭzi sensacion. La geamantoj devis disiri.

La obskuraj antaŭsentoj, de kiuj la animo de la Scuderi estis kaptita ek de la unua eniro de Brusson en ŝian domon, nun estis hororige viviĝintaj. Ŝi vidis la filon de sia amata Anne senkulpe implikita en tioma grado, ke preskaŭ ne ŝajnis imageble savi lin antaŭ hontiga morto. Ŝi respektis la heroecon de la junulo, kiu preferis morti kulplene, ol eldiri sekreton, kiu devis mortigi sian Madelonon. Inter ĉiuj eblecoj ŝi ne trovis iun ajn rimedon por elŝiri la povrulon el la ungegoj de la kruela kortumo. Kaj tamen ŝi estis firme konvinkita, ke ŝi ne rajtis rezigni pri klopodo por preventi la teruran maljustaĵon, kiun oni estis faronta. Ŝi turmentis sin kun ĉiuj eblaj konceptoj kaj planoj, kiuj tuŝetis eĉ la aventurecon, kaj pri kiuj ŝi same rapide rezignis kiel ŝi elpensis ilin. Pli kaj pli malaperis ĉiu eta ideo de iu solvo tiel, ke ŝi perdis la esperon. Sed la absolute pia, infaneca fido de Madelon, la glorigo, kun kiu tiu parolis pri la amato, kiu, nun baldaŭ absolvota de ĉiu kulpo, ĉirkaŭbrakos ŝin kiel edzinon, kuraĝigis la Scuderi denove en la sama grado, kiel ŝi emociiĝis pro tio ĝis profunden en sia koro.

Por nun finfine entrepreni ion, la Scuderi skribis al La Regnie longan leteron, en kiu ŝi diris al li, ke Oliviero Brusson estis klariginta al ŝi en plej fidinda maniero sian absolutan senkulpecon koncerne la morton de Cardillac, kaj ke nur la heroa decido, preni kun si en la tombon sekreton, kies malkaŝado perdus senkulpecon kaj virton mem, retenas lin fari antaŭ la tribunalo konfesion, kiu ne nur liberigus lin de la terura suspekto, ke li murdis Cardillac, sed ankaŭ de tiu, ke li apartenas al la bando de abomenindaj murdistoj. – Ĉion, al kio arda fervoro, al kio sprita elokventeco kapablas, la

Scuderi estis uzinta por mildigi la duran koron de La Regnie. Post malmultaj horoj La Regnie respondis, kiel elkore ĝojigas lin, ke Oliviero Brusson plene senkulpigis sin ĉe sia nobla, honesta patronino. Sed kio rilatas al la heroa decido de Oliviero, kunporti en la tombon sekreton, kiu koncernas la faraĉaĵon, li tamen bedaŭras, ke la *Chambre ardente* tian heroecon ne povas honorigi, sed tute kontraŭe devus trovi rompi ĝin per la plej fortaj rimedoj. Li esperas post tri tagoj posedi la strangan sekreton, kiu verŝajne aperigos la okazintan miraklon.

Sed tro bone sciis la Scuderi, kion intencis la teruriga La Regnie indikante tiujn rimedojn, per kiuj estus rompenda la heroeco de Brusson. Nun estis nedubeble, ke la torturo estis aljuĝota pri la mizerulo. En sia angoro la Scuderi havis fine la ideon, ke, por atingi prokraston, utilis la konsilo de juristo. Tiutempe Pierre Arnaud d'Andilly<sup>37</sup> estis la plej famkonata advokato en Parizo. Al ties profunda scienco, al la kompleksa intelekto egalas lia honesteco. Al tiu iris la Scuderi kaj rakontis al li ĉion, kio estis ebla sen lezi la sekreton de Brusson. Ŝi opiniis, ke d'Andilly kun fervoro okupos sin pri la senkulpulo; sed ŝia espero estis tre dolorige seniluziigata. D'Andilly estis ĉion trankvile aŭskultanta kaj tiam respondis ridetante kun la vortoj de Boileau: „*Le vrai peut quelque fois ne'être pas vraisemblable*.“<sup>38</sup> – Li pruvis al la Scuderi, ke la plej frapantaj kaŭzoj por suspekto atestas kontraŭ Brusson, ke la proceduro de La Regnie estas neniel karakterizenda kruela kaj tro hasta, sed estas tute leĝkonforma, ke li eĉ ne povus agi alimaniere sen lezi la devojn de la juĝisto. Li, d'Andilly, eĉ ne per la plej lerta defendado kuraĝas savi Brussonon de la torturo. Nur Brusson mem povus fari tion aŭ per sincera konfeso aŭ minimume per la plej detala rakontado pri la cirkonstancoj dum la murdado de Cardillac, kiuj finfine tiam eble kaŭzigus novajn esplorojn.

„Do mi ĵetos min antaŭ la piedojn de la reĝo kaj petos indulgon“, diris la Scuderi tute ekster si kun de larmoj duone sufokita voĉo. – „Tion“, vokis d'Andilly, „pro la ĉielo nepre ne faru, fraŭlino! Ŝparu al Vi tiun lastan helpilon, kiu, se ĝi unufoje fiaskus, restus por ĉiam sensukcesa. La reĝo neniam amnestios tian krimulon; la plej amara riproĉo de la popolo trafus lin. Estas eble, ke Brusson per la malkaŝado de sia sekreto aŭ io alia trovas rimedojn por neniigi la kontraŭ li direktatan suspekton. Tiam estos tempo por petegi favoron de la reĝo, kiu poste ne demandos, kio antaŭ la juĝejo estas pruvita aŭ ne, sed konsultos sian plej internan konvinkon.“ – Pro neceso la Scuderi devis konsenti kun la tre sperta d'Andilly. Mergita en profundan aflikton, cerbumante kaj denove cerbumante, kion ŝi nun pro la Virgulino kaj ĉiuj sanktuloj devas entrepreni, por savi la malfeliĉan Brusson, ŝi sidis je la malfrua vespero en sia ĉambro, kiam la Matinière eniris kaj anoncis la grafon de Miossens<sup>39</sup>, kolonelon de la reĝa gvardio. Tiu intencis urĝe paroli kun la fraŭlino.

„Pardonu“, diris Miossens, riverencante kun la bona konduto de soldato, „pardonu mian tiel malfruan aperon je malkonvena tempo. Ni soldatoj ne agas alie, kaj krome mi estos senkulpa per du vortoj; pro Oliviero Brusson mi venas al Vi.“ La Scuderi, ekstreme scivola, pri kio ŝi nun ekscios, vokis laŭte: „Ĉu Oliviero Brusson, la plej malfacila el ĉiuj homoj? – kiun rilaton Vi havas al tiu?“ – „Ah, mi ja pensis“, pludiris Miossens ridetante, „ke la nomo de Via protektato sufiĉos havigi al mi favoran orelon ĉe Vi. La tuta mondo estas konvinkita pri la kulpo de Brusson. Mi scias, ke Vi pensas alimaniere, kio tamen apogas sin nur sur la asertoj de la akuzato, kiel oni diris. Ĉe mi la situacio estas alia. Neniu krom mi povas esti konvinkita pli bone pri la senkulpeco de Brusson koncerne la morton de Cardillac.“ – „Oh parolu, parolu“, vokis la Skuderi, dum ŝiaj okuloj brilis pro raveco. – „Mi“, diris kun emfazo Miossens, mi mem estis tiu, kiu faligis la oldan oraĵiston en la strato St. Honoré ne malproksime de Via domo.“ – „Pro ĉiuj sanktuloj, Vi – Vi!“ vokis la Scuderi. – „Kaj“, daŭrigis Miossens, „kaj mi ĵuras al Vi, mia fraŭlino, ke mi estas fiera pri mia faro. Sciue, ke Cardillac la plej abomeninda, plej hipokrita malbonulo, ke estis li, kiu dum la nokto malice murdis

<sup>37</sup> neklare, kiu el la homoj kun tiu nomo estas de la aŭtoro menciita (ĝuste la antaŭnomo devus esti Arnauld).

<sup>38</sup> el „*Art Poétique*“ III 48: „*La vero ne ĉiam devas esti verŝajna*“.

<sup>39</sup> ne pli konata armeestro.

kaj rabis kaj tiom longe evitis ĉiujn kaptilojn. Mi ne scias mem, kiel okazis, ke moviĝis en mi interna suspekto kontraŭ la olda malbonulo, kiam li, plena de videbla malkvieto, portis al mi la de mi menditan ornamaĵon kaj kiam li ekzakte informis sin, por kiu mi destinis la ornamaĵon, kaj kiam li tre ruze estis esplorinta de mia ĉambristo, kiam mi kutimis viziti certan damon. – Jam delonge mi estis notinta, ke la malfeliĉaj buĉviktimoj de la plej abomena rabavido ĉiuj havis la saman mortigan vundon. Mi estis certa, ke la murdisto estis ekzercita kun la puŝo, kiu senprokraste devis mortigi, kaj ke li kalkulis kun ĝi. Se tiu mistrafus, devus okazi egalforta batalo. Tio iniciatis min havigi al mi rimedon por singardo tiel simplan, ke mi ne komprenas, kial aliuloj ne jam delonge pensis pri ĝi kaj savis sin antaŭ la minaca murdo. Mi portis malpezan brustkirason sub la veŝto. Cardillac atakis min de malantaŭe. Li ĉirkaŭprenis min kun giganta forto, sed la precize direktita piko deglitis de la fero. En la sama momento mi tordiĝis for de li kaj puŝis al li la ponardon, kiun mi tenis preta, en la bruston.“ – „Kaj Vi silentadis“, demandis la Scuderi, „ne denunciis la okazintaĵon al la juĝejoj, ĉu?“ – „Permesu“, diris Miossens, „permesu, fraŭlino, ke mi rimarkigas, ke tia denunco povis impliki min, se ne ĝuste en la pereon, tamen en la plej abomenindan proceson. Ĉu La Regnie, kiu ĉie flaras krimojn, simple kredintus al mi, kiam mi estus akuzinta pro provita murdo la honestan Cardillac, la modelon de ĉiu pieco ka virto? Kio estus okazinta, se la glavo de la justeco estus direktinta sian pinton kontraŭ mi mem?“ – „Tio ne eblis“, vokis la Scuderi, „Via deveno – Via rango ...“ – „Oh“, daŭrigis Miossens, „memoru nur pri la marŝalo de Luksemburgo, kiun la intenco, starigi al si la horoskopon far Le Sage, gvidis en la suspekton de murdo per veneno kaj en la bastilon! Ne, pro la sankta Dionizio, ne unu horon de mallibereco, ne la lobon de mia orelo mi ĵetos al la furioza La Regnie, kiu volonte tenus sian tranĉilon al la gorĝoj de ni ĉiuj.“ – „Sed tiel Vi ja liveras la senkulpan Brussonon sur la eŝafodon!“ interrompis lin la Scuderi. – „Senkulpan“, objektis Miossens, „senkulpan Vi titolas la komplikon de la abomeninda Cardillac, ĉu? kiu lin subtenis ĉe ties faraĉaĵoj, ĉu? kiu centfoje meritas la morton, ĉu? – ne, fakte, tiu sangas ĝuste, kaj kiam mi malkovris al Vi la veran konekson de la afero, mia altestimata fraŭlino, tio okazis en la supozo, ke Vi, sen liveri min en la manojn de la *Chambre ardente*, tamen kapablus uzi mian sekreton iamaniere por Via protektato.“

La Scuderi, ravita en ŝia pleja interno, ke ŝi tiom decide vidis firmigita sian konvinkon pri la senkulpeco de Brusson, ne hezitis malkaŝi al la grafo, kiu ja jam konis la krimojn de Cardillac, ĉion kaj postulis, ke li iru kun ŝi al d'Andilly. Al tiu nun ĉio devus esti malkovrata sub la sigelo de la sekreto; tiu konsilu, kio estos nun fareda.

D'Andilly, post kiam la Scuderi estis ĉion plej skrupule rakontinta al li, denove informiĝis pri la plej malgravaj cirkonstancoj. Li demandis precipe la grafon Miossens, ĉu li havas la firman konvinkon, ke li estas atakita de Cardillac kaj ĉu li rekonus en Oliviero Brusson tiun, kiu estis forportinta la kadavron. „Krom la fakto,“ respondis Miossens, „ke mi dum la lunluma nokto tre bone ekkonis la oraĵiston, mi vidis ankaŭ ĉe La Regnie mem la ponardon, per kiu Cardillac estas teren puŝita. Estas la mia, distingita per la gracia faritaĵo de la tenilo. Starante nur unu paŝon antaŭ li, mi rimarkis ĉiujn vizaĝtraĵojn de la junulo, de kies kapo estis falinta la ĉapelo; kaj certe mi kapablus identigi lin.“

D'Andilly kelkajn momentojn rigardis silente teren antaŭ si, tiam li diris: „En la kutima maniero Brusson nepre ne estas savebla el la manoj de la justico. Li pro Madelon ne volas nomi Cardillac murdrabisto. Li faru tion, sed eĉ, kiam li sukcesus pruvi tion, malkaŝante la sekretan elirejon, la kunrabiton tezonon, tamen trafus lin la mortopuno kiel komplikon. La sama situacio restas, se la grafo Miossens malkovrus al la juĝistoj la aferon kun la oraĵisto, kiel ĝi fakte okazis. – Prokrasto estas la unusola, al kio estas celende: Grafo Miossens iras al la Conciergerie, prezentigas al si Olivieron Brusson kaj identigas lin tiu, kiu forportis la kadavron de Cardillac. Li rapidas al La Regnie kaj diras: `En la strato St. Honoré mi vidis homon batatan teren, kiam alia alsaltis, sin klinis al la kadavro, lin, sentante ankoraŭ vivon en li, surŝultrigis kaj forportis. En Oliviero Brusson mi ekkonis denove ĉitium homon.“ Ĉitium depozicio ripetigas la pridemandadon de Brusson; konfronto kun la grafo Miossens. Sufiĉe, la torturo ne okazas, kaj oni esploras plue. Tiam estos tempo turni sin

al la reĝo mem. Al Via sagaco, mia fraŭlino, restas fari tion en la plej lerta maniero. Laŭ mia opinio estus bone malkovri al la reĝo la tutan sekreton. Per tiu atesto de la grafo Miossens la konfesoj de Brusson estos firmigataj. La samo eble okazos per sekretaj serĉoj en la domo de Cardillac. Ne verdikto, sed la decido de la reĝo, apoganta sin sur interna sento, kiu tie, kie la juĝisto devas puni, proklamas favoron, povas motivigi tion ĉion.“ – Grafo Miossens ekzakte observadis, kion d’Andilly estis konsilinta, kaj fakte okazis, kion tiu estis antaŭvidinta.

Nun estis la ĉefaĵo turni sin al la reĝo, kaj tio estis la plej malfacila punkto, ĉar li kontraŭ Brusson, kiun li opiniis solan la terura rabomurdisto, kiu dum tiom longa tempo estis metinta tutan Parizon en timon kaj teruron, sentis tian abomenon, ke li, ankaŭ nur singarde memorigata pri la fifama proceso, venis en la plej vehementan koleron. La Maintenon, fidela al ŝia maksimumo, ke ŝi parolu neniam kun la reĝo pri malplaĉaj aferoj, rifuzis ĉiun peradon, kaj tiel la sorto de Brusson troviĝis tute en la mano de la Scuderi. Post longa meditado ŝi kaptis decidon same rapide, kiel ŝi efektivigis ĝin: Ŝi vestis sin kun nigra robo el peza silkaĵo, ornamis sin kun la belega juvelaro de Cardillac, ĉirkaŭvolvis sin per longa nigra vualo kaj aperis tiel en la salonoj de la Maintenon ĵus je la horo, kiam la reĝo ĉeestis. La nobla figuro de la honorinda fraŭlino en tiuĉi solena aspekto havis majestecon, kiu devis vekti profundan respekton ĉe la frivola korteganaro, kiu kutimas agadi en la antaŭĉambroj laŭ sia senbrida, nenion respektanta maniero. Ĉiuj cedis flanken, kaj kiam ŝi nun eniris, la reĝo mem leviĝis tute mirigita kaj iris renkonte al ŝi. Jen briletis la belegaj diamantoj de la kolĉeno kaj de la braceletoj en liajn okulojn, kaj li vokis: „Pro la ĉielo, tio ja estas la juvelaro de Cardillac!“ Tiam turnante sin al la Maintenon, li aldonis kun ĉarma rideto: „Vidu, mia dam’ markizino, kiel nia bela fianĉino funebras sian fianĉon.“ – „Ej, sinjora moŝto“, la Scuderi objctis kvazaŭ daŭrigante la ŝercon, „kiel decus al dolorplena fianĉino ornami sin tiom pompe? Ne, mi komplete rezignis pri tiu oraĵisto, kaj mi ne pensus plu pri li, se ne kelkfoje aperus lia hororiga imago antaŭ miaj okuloj, kiel li estis murдите preterportata proksime de mi.“ – „Kiel“, demandis la reĝo, „kiel! Vi estas vidinta lin, la povran diablon?“ La Scuderi rakontis nun kun brevaj vortoj, kiel ŝi hazarde – la enmiksiĝon de Brusson ŝi ankoraŭ ne menciis – estis veninta antaŭ la domon de Cardillac, ĵus kiam la murdo estis rimarkata. Ŝi priskribis la akran doloron de Madelon, la profundan impreson, kiun efikis en ŝi la ĉielulino, la manieron, per kiu ŝi estis savinta la povrulinon kun la aplaŭdado de la plebo el la manoj de Desgrais.

Kun ĉiam intensiĝanta kaj altiĝanta intereso komencis nun la scenoj kun La Renie, kun Desgrais, kun Oliviero Brusson mem. La reĝo, entuziasmigita per la forteco de la plej vivanta vivo, kiu ardegis en la parolo de la Scuderi, ne rimarkis, ke temis pri la malica proceso de tiu al li abomeninda Brusson, li ne kapablis eligi eĉ unu vorton, povis nur de tempo al tempo ellasi per elvoko la internan emocion. Antaŭ ol li povis eviti tion – tute ekster si pro la neaŭditaĵo, kiun li nun estis ekkoninta, kaj ankoraŭ ne kapabla ordigi ĉion – la Scuderi jam kuŝis antaŭ liaj piedoj kaj petegis pri kompatato por Oliviero Brusson.

„Kion Vi faras“, diris la reĝo, kaptante ŝiajn manojn kaj premis ŝin en la seĝon, „kion Vi faras, mia fraŭlino! – Vi surprizas min en stranga maniero. Tio estas ja teruriga afero! – Kio garantias al mi la veron de la eksterordinara rakonto de Brusson?“ – Al tio la Scuderi: „La atesto de Miossens, la traserĉo en la domo de Cardillac, interna konviko – aĥ! la senkulpa koro de Madelon, la sama virto, kiun mi ekkonis ĉe la povra Brusson.“ – La reĝo, kiu estis respondonta ion, turniĝis pro iu sono, kiu ekestis ĉe la pordo. Louvois, kiu ĵus laboris en la apuda ĉambro, enrigardis kun zorgema mieno. La reĝo stariĝis kaj eliris, sekvante Louvoison, el la ĉambro. Ambaŭ, la Scuderi, la Maintenon, opiniis ĉitiun interrompon danĝera, ĉar la reĝo, unufoje surprizita, eble gardus sin denove fali en la saman kaptilon. Sed post kelkaj minutoj la reĝo revenis, paŝis rapide kelkfoje en la ĉambro tien kaj reen, haltis tiam, kunkroĉinte la manojn sur la dorso, proksime al la Scuderi kaj diris, sen alrigardi ŝin, duonlaŭte: „Nu bone, mi ŝatus vidi Vian Madelonon!“ – Poste la Scuderi: „Oh sinjora moŝto, je kia alt-alta feliĉo Vi dignas la povran, mizeran infanon – aĥ, nur Via mangesto necesus por vidi la etulinon ĉe Viaj piedoj.“ Kaj tiam ŝi paŝetis tiel rapide, kiel ŝi kapablis fari tion

en siaj pezaj vestoj, al la pordo kaj, vokinte eksteren, ke la reĝo deziras lasi antaŭ sin Madelonon Cordillac, ŝi venis reen kaj larmis kaj plorsingultis pro raviteco kaj emocio. La Scuderi estis antaŭe supozinta tian bonvolon kaj pro tio kunpreninta Madelonon, kiu ekstere atendis ĉe la ĉambristino kun mallonga peticio enmane, kiun d'Andilly estis formulinta por ŝi.

Post malmultaj momentoj ŝi kuŝis senvorte antaŭ la piedoj de la reĝo. Timo – konfuziĝo – timema respekto – amo kaj aflikto pelis pli kaj pli rapide la bolantan sangon tra la vejnoj de la povrulino. Ŝiaj vangoj ardis kun ruĝega purpuro, la okuloj briletis pro helaj larmoperloj, kiuj iom post iom falis desupren tra la silkaj okulharoj sur la belan liliodekoltaĵon. La reĝo ŝajnis esti frapita pro la miriga beleco de la anĝelulino. Li milde levis la knabinon, tiam li faris movon, kavazaŭ li intencus kisi ŝian manon, kiun li estis preninta. Li ree lasis ĝin libera kaj rigardis la gracion ulineton kun pro larmoj malseka vido, kiu atestis plej internan emocion. Mallaŭte la Maintenon flustris al la Scuderi: „ĉu ŝi ne similas al la La Vallière<sup>40</sup>, la etulino? – La reĝo tute perdiĝas pri la plej dolĉaj rememoroj. Vi gajnis la ludon!“

Kiel eble plej mallaŭte la Maintenon parolis, tamen la reĝo ŝajnis esti aŭdinta ĝin. Ruĝeco transflugis lian vizaĝon, lia rigardo preterglitis la Maintenonon, li legis la suplikon, kiun Madelon estis transdoninta al li, kaj tiam parolis milde kaj afable: „Mi ja certe pretas kredi, ke vi, mia kara infano, estas konvinkita pri la senkulpeco de via amato, sed ni aŭskultu, kion la *Chambre ardente* diras pri tio!“ – Milda movo kun la mano adiaŭis la etulinon, kiu pro larmoj perdis sian klaran vidon. – La Scuderi rimarkis kun teruro, ke la rememoro pri la Vallière, kiel utila ĝi komence estis ŝajninta, estis ŝanĝinta la animon de la reĝo, kiam la Maintenon estis citinta la nomon. Eble estis, ke la reĝo sentis sin maldelikate rememorigita, ke li estis oferonta la severan justecon al la beleco, aŭ eble okazis al la reĝo kiel al songanto, al kiu, kiam akre alvokita, la belaj magiaj bildoj, kiujn li estis ĉirkaŭbrakanta, rapide malaperas. Eble li nun ne plu vidis sian Vallièren antaŭ si, sed pensis nur al al *Soeur Louise de la miséricorde* (la monaĥeja nomo de la Vallière ĉe la karmelaninoj), kiu lin torturis per ŝia pieco kaj pentofaro. Kion alian oni povis fari nun krom trankvile atendi la decidojn de la reĝo. – Intertempe la depozicio de la grafo Miossens antaŭ la *Chambre ardente* estis konita, kaj kiel kutime okazas, ke la popolo, facile pelata de unu ekstremo en la alian, tiel tiu, kiun oni antaŭe insultis la plej abomena murdisto kaj kiun oni minacis disŝiri, antaŭ ol li estus suririnta la eŝafodon, estis nun priplendata kiel senkulpa ofero de barbara justico. Nur nun la najbararo rememoris pri ties virta vivo, la granda amo al Madelon, la fideleco, la sindoneco kun korpo kaj animo, kiun li estis montrinta kontraŭ la olda oraĵisto. – Tutaj kolonoj de plebo aperis ofte en minaca maniero antaŭ la palaco de La Regnie kaj kriis: „Eldonu al ni Olivieron Brusson, li estas senkulpa“, kaj ĵetis eĉ ŝtonojn kontraŭ la fenestroj tiel, ke La Regnie devis serĉi ŝirmon ĉe la Maréchaussée kontraŭ la incitiĝinta plebo.

Preterpasis pluraj tagoj, sen ke al la Scuderi la plej eta detalaĵo iĝis konata pri la proceso de Oliviero Brusson. Tute senkonsola ŝi iris al la Maintenon; sed tiu certigis, ke la reĝo silentas pri la afero kaj ke absolute ne ŝajnas konsilinde, memori lin pri tio. Ĉar ŝi krome demandis kun stranga rideto, kiel fartas la eta Vallière? la Scuderi konvinkiĝis, ke profunde en la interno de la fiero virino ekmoviĝis ĉagreno pri afero, kiu povis logi la eksciteblan reĝon sur terenon, pri kies magio ŝi komprenis nenion. Pro tio ŝi povis esperi absolute nenion flanke de la Maintnon.

Finfine la Scuderi sukcesis helpe de d'Andilly informiĝi, ke la reĝo havis longan sekretan interparolon kun la grafo Miossens; krome, ke Bontems, la plej intima ĉambristo kaj aferprizorganto de la reĝo, estis en la Conciergerie kaj parolis kun Brusson, ke fine dum la sama nokto ĝuste tiu Botems kun pluraj homoj estis en la domo de Cardillac kaj restadis tie longan

---

<sup>40</sup> *Louise-Françoise de La Vallière (1644-1710), estis amatino de Ludoviko XIV., sed pli poste pentinte tion, ŝi aliĝis en la jaro 1674 al monaĥinoj de la karmelana ordeno en Parizo.*

tempon. Claude Patru, la loĝanto de la plej suba etaĝo, konfirmis, ke la tutan nokton super lia kapo estis pumpumate kaj certe ĉeestis Oliviero, ĉar ties voĉon li perceptis klare. Tiom do estis certe, ke la reĝo mem ekzamenis la veran konekson de la afero; sed nekomprenebla restis la longa prokrakstigo de la decido. Ŝajne klopodis La Regnie ĉion, por firmteni inter la dentoj la viktimon, kio estis forŝirota de li. Tioĉi sufokis ĉiun esperon en la ekĝerma stadio.

Preskaŭ unu monato estis forpasinta, kiam la Maintenon diris al la Scuderi, ke la reĝo deziras vidi ŝin hodiaŭ vespere en ŝiaj, de la Maintenon, salonoj. La koro bategis al la Scuderi; ŝi sciis, ke nun la afero de Brusson decidiĝos. Ŝi komunikis tion al la povra Madelon, kiu el sia tuta koro preĝis al la Virgulino, al ĉiuj sanktuloj, ke ili do nepre veku en la reĝo la konvinkon pri la senkulpeco de Brusson.

Kaj tamen ŝajnis, ke la reĝo forgesis la tutan aferon; ĉar kiel alitempe, estante en ĉarmaj interparoloj kun la Maintenon kaj la Scuderi, li menciis ne per unu silabo la mizeran Brussonon. Finfine aperis Bontems, proksimiĝis al la reĝo kaj diris kelkajn vortojn tiom mallaŭte, ke ambaŭ damoj nenion el tio komprenis. – La Scuderi ektremis en la interno. Tiam la reĝo leviĝis, paŝis al la Scuderi kaj parolis kun brilaj okuloj: „Mi gratulas Vin, mia fraŭlino! – Via favorato, Oliviero Brusson, estas libera!“ – La Scuderi, al kiu la larmoj torentis el la okuloj, nekapabla pri unusola vorto, volis ĵeti sin antaŭ la piedojn de la reĝo. Tiu detenis ŝin de tio, dirante: „Nu, nu! Fraŭlino, Vi devus esti advokato en la parlamento kaj plenumi miajn jurajn aferojn, ĉar – pro la sankta Dionisio – neniu sur la tero rezistas al Via elokventeco. – Sed“ , li aldonis pli severe, „kiun la virto mem prenas sub sian protekton, ĉu tiu ne povas esti sekura antaŭ ĉiu mava akuso, antaŭ la *Chambre ardente* kaj ĉiuj kortumoj en la mondo?“

La Scuderi trovis nun vortojn, kiuj elfluis en la plej ardan dankon. La reĝo interrompis ŝin, anoncante al ŝi, ke en ŝia domo atendas ŝin multe pli arda danko ol li povus postuli de ŝi; ĉar verŝajne en ĉitiu momento la feliĉa Oliviero jam ĉirkaŭbrakas sian Madelonon. „Bontems“, tiel finis la reĝo, „Bontems elpagu al Vi mil luidorojn; tiujn Vi donos en mia nomo kiel fianĉintrezoron al la etulino. Ŝi edziniĝu al sia Brusson, kiu tian feliĉon tute ne meritias, sed tiam ili ambaŭ iru for el Parizo. Tio estas mia volo.“

La Martinière venis renkonte al la Scuderi per rapidaj paŝoj, malantaŭ ŝi sekvis Baptiste, ambaŭ kun pro gojo brilantaj vizaĝoj, ambaŭ jubilis ĝojkriante: „Li estas libera – li estas libera! – oh la karaj junaj homoj!“ La feliĉa paro ĵetis sin antaŭ la piedojn de la Scuderi. „Oh, mi estas ja sciinta tion, ke Vi sole savos al mi la edzon“, vokis Madelon. „Ah, la kredo al Vi, mia patrino, staris ja fiksita en mia animo“, vokis Oliviero, kaj ambaŭ kisis la manojn de la honesta damo kaj verŝis mil ardajn larmojn. Kaj tiam ili denove ĉirkaŭbrakis sin kaj asertis, ke la supernatura beateco de ĉitiu momento kompensas ĉiujn neeldireblajn suferojn de la pasintaj tagoj; kaj ili ĵuris neniam forlasi sin ĝis morto.

Post kelkaj tagoj ili jungiĝis per la beno de la sacerdoto. Ankaŭ se ne estintus la volo de la reĝo, Brusson ne povintus resti en Parizo, kie ĉion memorigis lin pri tiu teruriga tempo de la fifaraĵoj de Cardillac, kie iu ajn hazardo povus malamike senvualigi la malbonan sekreton, nun jam al ankoraŭ pli da personoj konata, kaj detruita lian kvietan vivon porĉiam. – Tuj post la geedziĝo li translokiĝis, akompanata de la benoj de la Scuderi, kun sia juna edzino al Ĝenevo. Riĉe ekipita per la fianĉintezoro de Madelon, talentita per rara lerteco en sia metio, per ĉia civitana virto, li atingis tie feliĉan, senzorgan vivon. Al li plenumiĝis la esperoj, kiuj la patron estis trompitaj ĝis en la tombon.

Unu jaro estis pasinta ekde la forvojaĝo de Brusson, kiam aperis publika anonco, subskribita far Harloy de Chauvalon<sup>41</sup>, ĉefepiskopo de Parizo, kaj la parlamenta advokato Pierre Arnaud

---

<sup>41</sup> *Harloy de Chauvon (1625-1695)*



d'Andilly, kun la enhavo, ke pentema pekulo sub la sigelo de la konfeso estas transdoninta al la eklezio riĉan rabitan trezoron de juveloj kaj ornamaĵoj. Ĉiu, al kiu proksimume ĝis la fino de la jaro 1680 estas rabita iu ornamaĵo, precipe per murdatako sur publikaj stratoj, prezentu sin ĉe d'Andilly; li ricevu la ornamaĵon, kondiĉe, ke la priskribo pri la al li rabita ornamaĵo konformas precize al iu trovita valorajo kaj ne ekzistas alikaze neniu dubo pri la legitimeco de la pretendo.

Multaj, kiujn la listo de Cardillac nomis murditaj, sed nur per pugnobato senkonsciaj, aperis iom post iom ĉe la parlamentadvokato kaj ricevis je ilia ne malgranda surpizo la al ili rabitan juvelaron. Ĉio cetera falis en la trezoron de la preĝejo de Sankta Eŭstakio.

*El la germana tradukis en la Laborrondo Esperanto: Armin Grötzner  
kun la helpo de Brunhilde Lorenz, Siegbert Herrgesell kaj Heidrun Wilczek*